

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

La Ondo numero 150

Jukka Pietiläinen pri la
Esperanta gazetaro

“Ronda Tablo” de la
diligenta kolegaro

Kial mi legas “La
Ondo”?

“Beletra Almanako”,
aŭ legado sub palmoj

Novajoj el Esperantujo

En kaj apud Sankt-
Peterburgo

Nova lingva “ministro”
en Eŭropo

Tri recenzoj

“La Ondo” sub lupeo



Aprilo
2007

№4

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2007. №4 (150)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2007

Internacia tarifo: 32 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 18 eŭroj

Ruslanda tarifo: 390 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj

Perantoj vidu la liston sur la paĝo 23 de la februara kajero.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 700 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2007.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2007, №4 (150).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 26 марта 2007 г.

Цена свободная. Тираж: 700 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.



Bildo de L.L. Giloteaux (Croix, Francio)

Ĉi tiu *Ondo* estas la 150a, kiun ni eldonis. Sed jubileo ne estas io tro malofta. Ja ankaŭ la marta *Ondo* estis jubilea (101 *Ondoj* de Saĥarov + 149 niaj *Ondoj* = 250). Do ni decidis, ke ni mem skribu nenion pri la jubileo. Ni nur danku niajn legantojn, por kiuj la revuo estas eldonata, kaj lasu ilin respondi al la demando: “Kial mi legas *La Ondon*?”:

... ĉar mi trovas en ĝi interesajn artikolojn pri eventoj okazintaj en Esperantujo. Sed precipe mi ŝatas legi mallongajn rakontojn ĉu originalajn ĉu tradukitajn. Kun granda plezuro kaj intereso mi legis la artikolojn de Halina *Paĝoj el la historio de Sukcena Lando*. Mia filo Adamo preferas legi la anguleton *Spritaj splitoj kaj preskeraroj*. (Elżbieta Frenszkowska, Pollando)

La Ondon la unuan fojon mi vidis en Moskvo ĉe Miŝa Abramoviĉ. Li kaj Valentin Seguru entuziasmis pri ĝi. Dum la vespero Miŝa ne permesis uzi ĝin por mortigi kulojn. Tiaj estis la komencoj, poste dum jaroj mi alkutimiĝis. Gratulon pro la alta nivelo, sendependeco kaj interesa enhavo. Mi transdonas bondezirojn al Halina, Aleksander kaj la tuta onda, redakta kaj kunredakta bando, interalie al Gleb Malcev. (Paweł Janowczyk, Pollando)

... ĉar *La Ondo* estas bona ĉiufanka movada revuo. Efektive ne estas multaj movadaj revuoj en Esperantujo, eĉ preskaŭ ne estas. Nur *Esperanto* de UEA povas konkurenci. Do, ĉiu kiu estas vera movadano eĉ ne povas ne legi *La Ondon*. Krome, *La Ondo* konstante tenas profesian altan nivelon, kio, sendube, allogas seriozajn esperantistojn. (Povilas Jegorovas, Litovio)

... ĉar laŭ la aspekto, speco de papero kaj fotoj ĝi estas unu el la plej belaj revuoj kiujn mi konas. La enhavo laŭ la tekstoj estas ankaŭ interesa, sed mi havas unu ortografian rimarkon. Mi ne scias, kiu kulpas, sed kelkfoje mi vidas, ke la nomo de la lingvo Esperanto estas skribita ĉe vi minuskle. Tion mi opinias grava “makulo” sur via “infano”. (Mila vd. Horst-Kolińska, Nederlando)

... ĉar ĝi estas interesa, serioza, enhavriĉa, profesie farata. Cetere, *La Ondo* en Ruslando estas ja ununura plenalora Esperanto-revuo (ne “bulteno”, ne “informilo”). Rimarkinde estas, ke la revuo daŭrigas la tradicion de la fama antaŭevolucia periodaĵo, kiun eldonadis Aleksandr Saĥarov. (Igorj Simonov, Ruslando)

Sur la kovrilpaĝo estas prezentata la japana lingvo en la Peterburga Lingva Festivalo (*Fotis Sergeo Andrejsons*).

Esperanto-gazetaro: historio, nuntempo kaj perspektivoj

Jukka Pietiläinen estas esploristo en la departemento pri ĵurnalistiko kaj amaskomunikado en la universitato de Tampere. Li estas unu el tre malmultaj fakuloj pri Ruslanda gazetaro en la mondo (ekster Ruslando mem). En Esperantujo li estas konata kiel fakulo pri informado (komisiito de UEA pri tiu fako) kaj pri la Esperanta gazetaro.

10 mil 440 gazetoj

La kutimaj informiloj pri Esperanto notas nombron de Esperanto-gazetoj kutime en nivelo de 100–150 gazetoj. *Esperanto en perspektivo* (EeP) menciis ĉ. 110 periodaĵojn komence de la 1970aj jaroj. Tamen la plejparto el gazetoj estas malgrandaj, lokaj aŭ naciaj, aperantaj nur kvar- aŭ ses-foje jare. Malmultaj havas vastan internacian legantaron. Plej multaj havas plimulton el sia legantaro en la sama lando kie ili aperas. Klara escepto estas organoj de internaciaj Esperanto-asocioj. Inter ili granda parto estas apenaŭ interesaj al averaĝa leganto, kiu ne membras en tiuj organizoj.

Pli detalaj bibliografiaj informoj pri Esperantaj gazetoj aperis en eldonaĵo *Periodaĵoj* en 1993–1994. Laŭ ĝi aperis entute 10 mil 440 periodaĵoj en aŭ pri Esperanto kun entute 37 046 jarkolektoj. Do, averaĝa Esperanta periodaĵo havis malpli ol kvar jarkolektojn. Tiu nombro de jarkolektoj fakte rezultas proksimume 350 periodaĵoj averaĝe aperintaj. La nombro estas iomete tro alta, ĉar enkalkuliĝas ankaŭ jarlibroj kaj aliaj nur unufoje jare aperantaj aferoj. Ankaŭ multaj el tiuj gazetoj aperis nur tre loke kaj tre mallonge, foje nur ununumere.

Kiaj gazetoj?

Laŭ la kategorioj de EeP ekzistas landaj organoj, gazetoj kun ĝeneralinforma enhavo, kulturaj revuoj, politikaj periodaĵoj kaj fakaj periodaĵoj. La klasifiko ne ĉiam estas tre klara: EeP metas religiajn gazetojn sub la fakaj, sed landajn inform-gazetojn kiel *El Popola Ĉinio* sub politikaj periodaĵoj.

Tre malmultaj gazetoj havis iom influan rolon en Esperanto-movado. Tamen eĉ la plej malgravaj kaj lokaj estis gravaj edukejoj de komencantaj Esperantaj ĵurnalistoj kaj unuaj taŭgaj forumoj por komencantaj verkantoj, por ne paroli pri distribuo de informoj.

Plimulto el Esperantaj gazetoj estis lokaj aŭ maksimume landaj, kvankam ofte kelkaj ekzempleroj estis senditaj ankaŭ al aliaj landoj. Se ni difinus internacian Esperanto-gazeton tiel, ke maksimume duono el abonoj estas en unu lando, la nombro estis ĉiam

malgranda. Paroli pri granda nombro de Esperantaj gazetoj estas surbaze de tio iom fanfara, kvankam foje ankaŭ naciaj Esperanto-gazetoj estas gravaj kaj influaj gazetoj. Eĉ la unua gazeto en Esperanto, *La Esperantisto*, estis komence legata plejparte en Ruslando, kie plimulto de esperantistoj vivis en tiu tempo.

Esperantaj gazetoj kutime silentas pri siaj eldonkvantoj. Laŭdinda escepto estas UEA, kiu publikigas ekzaktajn nombrojn, kaj *La Ondo*, kiu estas devigata publikigi tiun informon surbaze de Rusia leĝo. La abonkvantoj estas magraj: *Esperanto* 4084 abonantoj, *Kontakto* 922, *La Ondo* 545. Kaj tiuj ĉi apartenas al la plej disvastiĝintaj gazetoj. El la aliaj eble nur *Monato* atingas la similan nivelon; pri *Literatura Foiro*, *Heroldo* kaj *Fonto* ne uzeblas eĉ bonaj pritaksoj.

Disvastigo de informoj pri ekzisto de bonaj Esperanto-gazetoj estas problemo, kiun multaj redaktistoj pripensas tro malmulte. Ekzemple mi ne vere konsciis pri la ekzisto kaj kvalito de *Fonto* dum pluraj jaroj, kvankam mi sciis, ke tia gazeto ekzistas. Se mi sciintus, ke en ĝi aperas gajnintoj de belartaj konkursoj kaj pluraj aliaj interesaj artikoloj, mi estus aboninta ĝin eble dek jarojn pli frue. Kaj mi ne apartenas al plej malinformitaj esperantistoj...

Inter internaciaj nefakaj gazetoj plej elstaras la movadaj kaj kulturaj gazetoj. Movadaj tendencas esti organoj de asocioj, kiel revuo *Esperanto*, eble la plej disvastiĝinta gazeto dum la tuta historio de Esperanta gazetaro. Inter aliaj organoj, ekzemple, *Sennaciulo* kaj *Sennacieca revuo* havas brilan historion. Ankaŭ kulturo estas unu el fortaj flankoj de internaciaj Esperanto-gazetoj. Inter la plej brilaj gazetoj estis tiuj, kiuj okupiĝis plejparte pri kulturo: *Literatura Mondo*, *La Nica Literatura Revuo*, *Literatura Foiro*, *Fonto*...

Malmultaj Esperantaj gazetoj temas plejparte pri nemovadaj kaj (ne Esperantaj) kulturaj aferoj. Pli frue unu el tiaj gazetoj estis *Kontakto*, sed ekde 1979 *Monato* estas la plej brila inter ili. *Monato* faris de la komenco tion, kion kelkaj nacilingvaj gazetoj eksperimentis



tis nur poste: nome, la lokaj ĵurnalistoj kutime konas la lokajn aferojn pli bone ol t.n. “paraŝutaj ĵurnalistoj”, kiuj venas al “varmegaj punktoj” nur kiam “okazas io” kaj ofte misinformas pli ol informas. *Monato* realigas la idearon de esperantismo: respekti la lokan kaj kunigi la lokan kun internacia nivelo. Necesus plifortigi la ekzistantajn kaj bone funkciantajn gazetojn kaj eble rezigni pri kelkaj tro marĝenaj: pluraj artikoloj, ekzemple, de *Etnismo* povus havi pli grandan legantaron en *Monato*.

Kiu(j) faras la gazetojn?

Eble 90% el Esperanto-gazetoj estas realigitaj per unuopaj redaktoroj entuziasmuloj. Nur malmulto havas ĵurnalisman edukon, sed en tio ili ne multe diferencas je, ekzemple, finlandaj ĵurnalistoj, el kiuj nur duono havas ĝuste ĵurnalisman edukon.

Redaktoroj-entuziasmuloj povis certigi aperadon de gazetoj, eĉ kiam tio ne estis profitdona aŭ eĉ ne kiois la kostojn. Tamen pro la sama kialo nur en tre maloftaj kazoj okazis, ke internacie disvastiĝinta Esperanto-gazeto sukcesis transiri de unu redaktanto al alia. *Norda Prismo* estis kreaĵo de Ferenc Szilágyi, kaj ĝi kolapsis kelkajn jarojn post la morto de la fondinto. *Fonto* estas kreaĵo de Gersi Alfredo Bays kaj *La Ondo de Esperanto* de Korjenkov kaj Gorecka; kaj apenaŭ imageblas, ke iu alia povus transpreni la redaktadon. Malmultaj sukcesaj ekzemploj estas *Lingvo Internacia*, kiu havis tri redaktorojn inter 1895 kaj 1914, kaj *Heroldo de Esperanto*, kiu jam havas la kvaran redaktoron. Tamen la rolo de *Heroldo* lastatempe ŝanĝiĝis. Ankaŭ *Monato*

sukcese transiris de unu redaktoro al nova skipo, kvankam la unua redaktoro ankoraŭ restis en la kunlaborantaro.

Gazetoj de diversaj organizoj havas pli fortan daŭripovon, ĉar la organizo garantias la aperon, kvankam foje estus problemoj trovi novan redaktoron. Tiel ankaŭ la naciaj Esperanto-gazetoj estas inter la plej vivodaŭraj. Indus menci, ekzemple, la svedan *La Espero*, fonditan jam en 1906. Inter internaciaj gazetoj plej malnovaj estas la religiaj *Dia Regno* (1908) kaj *Espero katolika* (1906).

Utilo de la sendependa gazetaro

“Sendependa gazetaro estas utila por demokratio” estas slogano de la posedantoj de privataj komercaj gazetoj. En Esperanto tiaj gazetoj preskaŭ ne ekzistas, kvankam kelkaj gazetoj sukcesas financi sin mem. Sendependaj gazetoj estas maloftaj, sed ankaŭ ili ekzistas. *Heroldo de Esperanto* estis tia, kiam ĝin redaktis Teo Jung kaj Ada Fighiera-Sikorska. *Eventoj* estis tia: mi memoras la malplenajn angulojn, kie devis aperi respondoj de tiuj estraranoj de UEA, kiuj ne respondis al la demandoj de la gazeto. *Libera Folio* kaj ankaŭ *La Ondo* plu portas la torĉon de sendependo.

Estas nenio nova ankaŭ en rilatoj inter la estroj kaj la redaktoroj. Lapenna kritikis *Heroldon* en 1964 jene:

«La redaktoroj de la t.n. “sendependaj” periodaĵoj respondecas al neniu krom al si mem. Se ili komprenas sian sendependecon kiel ian rajton publikigadi tendencajn malĝustaĵojn aŭ misrepresentajn artikolojn, tiam ili misuzas la principon de preslibereco kaj transformas sian sendependecon en senrespondecon» (*Esperanto*, 1964, №7-8, pĝ. 125).

Karakterize, ke ĉiam por prezidantoj kaj potenĉavuloj estas plej facile scii, kio estas misrepresentado kaj kio malĝustaĵo. Ne dependi de iu alia ol la redakcia prijuĝo estas grava. Fakte tiuj gazetoj dependas de legantoj, kiuj finansas ilian aperon. Ili ankaŭ ne dependas de organaj devoj, kiuj tamen povas esti interpretataj tre diversmaniere: organo ja povas singarde sekvi la oficialan linion de la estroj, sed organo povas ankaŭ pli vaste orientiĝi al la membraro de iu organizo kaj reprezenti membraran volon, foje eĉ kontraŭ la estraro.

Same kiel Lapenna kritikis *Heroldon* en la 1960aj jaroj, la gvidantoj de nuntempaj Esperanto-organizoj sentas sin malfacile kiam la gazetaro malkovras, ke la realo ne estas same brila



ol ili mem imagas. Tamen la tasko de Esperanta gazetaro ne estu kontraŭstari Esperanton mem kaj la organizojn kiuj strebas ĝin utiligi. Malgraŭ tio, por simplaj esperantistoj estus pli bone, se la stultaĵoj estus malkovrataj en la propra rondo antaŭ ol ili detruas la renom de Esperanto ĉe aliuloj. Sendependo estas utila kaj inda eco ankaŭ en movadaj organoj. Same kiel en gazeto de politika partio, en Esperanta organo devus aperi ankaŭ kritikoj kontraŭ la gvidantaro, se estas kialo por tio. Necesus ke la plej bona informanto pri aferoj de la propra asocio estas la propra organo, ankaŭ tiam, kiam temas pri malagrablaj aferoj.

Ne plu ŝtata financado

Iom bedaŭrinda fenomeno estas, ke la internaciaj gazetoj financitaj de la ŝtatoj, en kiuj ili estis eldonitaj, malaperis post la komenco de 1990aj jaroj. *Hungara vivo* kaj *El Popola Ĉinio* estis inter plej disvastiĝintaj Esperantaj gazetoj. *El Popola Ĉinio*, kiel malmultekosta kaj interesa revuo, estis mia unua regula legaĵo en Esperanto. Ne plu estas politika bezono por tia publikado en Esperanto, kaj ankaŭ ne multe en iu alia lingvo. Same malaperis, ekzemple, finnlingvaj gazetoj pri GDR aŭ Soveta Unio. Nu, malaperis ankaŭ tiuj ŝtatoj. Iusence ankaŭ la minaco pri nuligo de Esperantaj elsendoj de Pola Radio apartenas al la sama fenomeno.

Gazete aŭ/kaj rete?

Estonteco de la gazetaro meditigas ne nur esperantistaron. Ĉie la gazetoj iradas en la reton. Por multaj gazetoj retaj solvoj ĝis nun estas eksperimentoj, ili ne portas profiton, sed eble ankaŭ ne forprenas tradician cirkuladon.

Ĉu la reta eldonado forprenas la publikon el la paperaj gazetoj? Eventuale jes, sed mankas veraj esploroj pri la afero (ankaŭ nacilingvaj gazetoj hezitas pri la respondo). Aperigi parton (aŭ eĉ tuton) el materialo en la reto, eble iomete malpli frue ol aperas la papera gazeto, povus funkcii ankaŭ kiel reklamilo por la papera eldono. Nuntempe ankoraŭ (eble ĝis eterne) pli facile legi el papero ol el ekrano kaj reta eldonado ne kontentigas tiujn, kiuj havas rimedojn aboni paperajn gazetojn. Mi supozas, ke nur tre malmultaj abonis gazetojn en la reto, malgraŭ signife malplikosta kotizo. La risko por eldonantoj tamen estas, ke la retaj gazetoj disvastiĝus senkoste en la reto. Teknike ja eblas enmeti distingilon, kvazaŭ la adresetikedon, sur pdf-dosieron, kiu indikas, kiu elretigis la gazeton por si.

Pro interreto multaj esperantistoj estas pli bone informitaj pri movadaj aferoj ol antaŭe. Malantaŭ-kurtenaj ludoj pri elektoj malkaŝiĝas pro malatente sendita retmesaĝo al publika listo, ajnaj sekretoj facile fariĝas publikaj. Pensu nur, se la reto ekzistus jam en 1974.

Ankaŭ por reta gazeto la redakta laboro estas grava. En la reto eblas trovi amason da materialo. En tia situacio eĉ pli gravas, ke iu elektas, kombinas, kolektas kaj prezentas la materialon en formo, kiu ne estas tro temporaba por leganto. Dum la reta eldonado fariĝas pli ofta, necesas eĉ pli da profesieco en ĵurnalisma laboro. Tamen en la reto ankoraŭ maloftas pagaj servoj kaj igi Esperantan gazeton finance daŭripova en la reto povas esti eĉ malpli facile ol sur la papero.

Necesus pli eniri la reton, aparte kiam temas klare pri neprofitdonaj gazetoj. Ekzemple en la reto jam ekzistas multege da nacilingva scienca materialo senpage, ofte en aliaj lingvoj ol la angla. La anglalingvaj sciencaj revuoj devigas uzantojn (kutime universitatajn bibliotekojn) pagi, sed rusaj, hispanaj, portugalaĵ ktp. estas ofte senpagaj. Necesus fondi bonkvalitajn sciencajn retajn gazetojn, ĉu surbaze de *Scienca Revuo*, ĉu sendepende de ĝi. La reto povas doni novan vivon al iamaj gazetoj: necesus enretigi malnovajn jarkolektojn kaj ebligi konsultadon de ilia enhavo. Eble en tio estus taŭga celo por iu ekzistanta fondaĵo aŭ loko por nova fondaĵo. Tekniko ekzistas, skanemuloj troviĝas en malmultekostaj landoj, retejoj haveblas eĉ senpage.

Jukka Pietiläinen

Nia gazetaro vide de redaktoroj

La Ondo invitis la redaktorojn de plej legataj internaciaj (nefakaj) Esperanto-gazetoj respondi kvar demandojn pri la temo *Esperanto-gazetaro*. Ni dankas la respondintajn redaktorojn kaj notas ke la redakcioj de *Juna Amiko*, *La Gazeto* kaj *Sennaciulo* ne respondis.

1. Kiun rolon havas via gazeto en Esperantujo? Kiujn atingojn kaj problemojn ĝi havis lastatempe?
2. Kiom da abonantoj kaj kioman eldonkvanton vi havis en 2006? Ĉu via abonantaro kreskis aŭ malkreskis en la lastaj jaroj? En kiuj landoj estas plej multaj abonantoj?
3. Kiel vi taksas la nunan staton de la Esperanta gazetaro? Kia ĝi estos en la proksima estonteco?
4. Kion vi pensas pri *La Ondo de Esperanto*?



Esperanto. La unua numero aperis 18 jun 1905 (la fondinto: Paul Berthelot). Ekde 1908 ĝi estas organo de UEA kaj aperas ĉiumonate, krom aŭgusto.

Respondas **Stano Marček** (redaktoro, sur la supra foto)

1. Laŭ *Enciklopedio de Esperanto* la revuo *Esperanto* estas la ĉefa gazeto de la Esperanto-movado. Mi kredas ke tiun rolon ĝi daŭre havas. Ĝi ja estas organo de la plej granda Esperanto-asocio kaj havas legantojn en 115 landoj de la mondo. Problemoj? La spaco. Ne eblas aperigi ĉion aperigindan sur 24 paĝoj monate. Bedaŭrinde multaj bonaj artikoloj restas en tirkestoj.

2. Pagitaj abonoj: 2003: 4049, 2004: 4118, 2005: 4084, 2006: 4089. La revuo aperas en eldonkvanto 5 500 ekz. kaj atingas ankaŭ honorajn membrojn, multajn instituciojn, bibliotekojn, eldonejojn, redakciojn kaj asociojn. Plej multaj abonantoj estas en Francio (396).

3. La stato de nia gazetaro certa- grade respegulas la staton de nia movado ĝenerale. Tamen parte la rolon de la paperaj gazetoj transprenas la retaj gazetoj. Precipe ĉe la plej juna generacio (kial pagi paperan gazeton se ĉio troveblas rete). Kio pri la estonteco? Ĝi estas en niaj manoj.

4. Mia plej sincera konfeso estas en la fakto, ke mi fariĝis ĝia peranto en Slovakio.

Heroldo de Esperanto. Trisemajna gazeto pri la esperanta mondo. 4-paĝa, formato A3. Fondita en 1920 de Teo Jung, ne aperis dum la mondmilito; eldonas, posedas kaj administras LF-koop en Svislando, presejo kaj ekspedisto en Bulgario.

Respondas **Dieter Rooke** kaj **Giorgio Silfer** (kunredaktoroj)

1. [Respondas Silfer] Kiel ĉiam, ĝi estas politike kaj religie sendependa. Pli ol antaŭe, ĝi donas la parolon al ĉiuj komponantoj de Esperantio, interalie per rektaj intervjuoj al la gvidantoj (de Corsetti ĝis Želazny). En la epoko de Ada Sikorska, HdE estis la ĉefa opozicia organo kontraŭ la asocioj gvidataj de Lapenna (UEA ĝis 1974, poste ICNEM), kaj ekde 1975 ĝi fariĝis preskaŭ duoblaĵo de Revuo *Esperanto* — preskaŭ, ĉar s-ino Sikorska ofte havis pli da profesia talento ol roterdamaj kolegoj. Niaj problemoj dependas ĉefe de la altiĝantaj tarifoj de la bulgara poŝto, kaj de la misfunkciado de aliaj poŝtoservoj, ekzemple en Italio.

2. [Respondas Rooke] Precizan statistikon vi demandu de la eldonejo, ne de la redakcio. Ni scias ke efektivaj abonantoj estis milcento, kiam la gazeto estis vendita al LF-koop; hodiaŭ ili estas milo, el kiuj du trionoj ne abonis en 1996, kaj multaj abonas ankaŭ *Literaturan Foiiron*. Do okazis enorma ŝanĝo en la klientaro.

[Aldonas Silfer] En la epoko de Fighiera Sikorska la abonantaro koncentriĝis en sep-ok landoj, kiuj solaj kovris 90% de la merkato. Hodiaŭ en tiuj landoj estas malpli ol antaŭe (eĉ la blufa ducento en Pollando forvaporiĝis

tuj, kiam la tarifo por poloj iĝis egala al tiu por bulgaroj, hungaroj, rusoj — do duono de la internacia tarifo), sed kompanse okazis kresko en pluraj aliaj landoj. Kaj tre rimarkinda estas la nuna kvanto kaj kvalito de konstantaj kunlaborantoj.

3. [Respondas Silfer] Se temas pri la asociaj organoj, ilia vivo estas strikte ligita al tiuj asocioj mem. Tio kaŭzas ke ili malmulte kontribuas al la kvalita kresko de nia gazetaro, kvankam ekzistas gratulindaj esceptoj. Ekster la asociaj organoj, la krizo kiu trafis la redakciojn (ne nur de paperaj periodaĵoj, sed ankaŭ de retgazetoj kaj radioj) en 2006 pravas, ke la problemoj ne dependas de la teknologia evoluo. Ekzistas demando: ĉu la gazetoj kompletas al la cetera eldonado aŭ ne? En la nunaj ĉefaj eldonaj polusoj (UEA, SAT (SAT-Amikaro), FEL, *Sezonoj*, LF-koop) la gazeto estas certagrade reklamilo de la entrepreno. Plej malmulte ĉe LF-koop, kiu fakte produktas precipe periodaĵojn, dum la ceteraj precipe librojn aŭ/kaj renkontiĝojn. Tio kreas formon de interdependo, kiu bremsas aŭtonome kvalitan kreskon de nia gazetaro.

4. [Respondas Rooke] Kelkajn numerojn mi legis, ekzemple mi rememoras artikolon pri Kaliningrado — aŭ pri la fotokonkurso. Ankaŭ pri elekto de la esperantisto de la jaro mi scias.

[Respondas Silfer] La revuo postrestas la grafikan evoluon en Esperantio, sed kompanse nete superas la organon de UEA kaj nordeŭropan skandalisman retgazeton, pro la objektiveco kaj bunteco de la informado.

Monato. Fondojararo: 1979. Nuna eldonanto: Flandra Esperanto-Ligo. Eldonantoj en la historio: TK/Stafeto, UEA. Eldonritmo: 11 fojoj jare. Paĝonombro: mezume 28 paĝoj A4.

Respondas Stefan Maul (ĉefredaktoro) kaj Paul Peeraerts (redakcia sekretario)

1. *Monato* ne estas movada revuo, sed gazeto, kiu uzas Esperanton por informi internacie pri politiko, ekonomio kaj kulturo. Do ĝi apartenas al la kulturo de Esperantujo. Tio signifas, ke ĝi estas grava ekzemplo de praktika utiligado de la lingvo, kio facile konvinkas neesperantistojn pri la valoro de Esperanto. Problemo por *Monato* ĉiam estas, ke tia prestiĝa revuo estas relative multekosta, tiel ke nur malmultaj povas aĉeti ĝin. Ke ĝi tamen atingis jam sian 28an jarkolekton, jen grava atingo kaj ne memkomprenebla sukceso.

2. La abonantaro restas tre stabila inter 1600 kaj 1800. Ĉiujare parte forfalas sed aldoniĝas regule same multe da novaj abonantoj. Jen la distribuo laŭ landoj: Germanio 12%; Francio 11%; Belgio 10%; Japanio kaj Usono po 7%; Brazilo 5%; Britio, Hispanio, Italio, Nederlando, Svedio po 3%; Aŭstralio, Finnlando, Hungario, Ruslando, Svislando po 2%. Kvindeko da aliaj landoj malpli ol 2%.

3. Ŝajnas, ke la Esperanto-gazetaro solidiĝis. La aktuale aperantaj periodaĵoj probable daŭre eltenos, ĉar plejparte ili estas profesi-nivelaj. Timoj, ke ili perdos subtenon pro furoranta interreto supozeble estas superflujaj. La reto ja estas tre grava por Esperantujo, sed ĝi ne povas anstataŭi presitajn komunikilojn.

4. Bedaŭrinde, ni ambau ne povas respondi, ĉar ni ne ricevas la revuon.



La KancerKliniko. Fondita en 1977, kvarmonata + unu Krom (suplemento literatura, politika...), 28 paĝoj (formato A4).

Respondas Ĵak Le Puil (ĉefo, sur la supra foto)

1. Libera “zageto” por liberaj homoj. Ŝajnas, ke multaj homoj elektas aperigi sian prozon en LKK... kiam pro cenzuro ili ne povas trovi alian lokon... La unua atingo estas la 30-jariĝo kun fidelaj kunlaborantoj ekde la unua numero kaj daŭra alveno de novaj talentuloj. Magras la problemoj kvankam ni certe ŝatus havi iom pli da abonantoj, i.a. por aperigi pli da koloraj paĝoj kaj pli da paĝoj entute...

2. La eldonkvanto varias de 300 al 350. Plej multaj abonantoj en Francio, Belgio, Usono.

3. Terure mankas “liberaj” gazetoj. Feliĉe kelkaj “asociaj” estas legindaj (*Brita Esperantisto, La Sago, Brazila Esperantisto...*). Pri la estonteco mi ne estas profeto!

4. Certe unu el la plej bonaj... malgraŭ iom tro da laŭdo, atentigo al LF!

Literatura Foiro. Fondita de La Patrolo en 1970. Posedas, eldonas kaj administras LF-koop. Organo de la Esperanta PEN-Centro kaj informilo de la Lingva Komitato de Esperantio. Ses numeroj jare po 56 paĝoj.

Respondas Ljubomir Trifonĉovski (ĉefredaktoro)

1. *Literatura Foiro* estas kultura revuo en esperanto, kiel difinite en la subtitolo. Krom literaturo originala kaj tradukita, sur ĝiaj paĝoj oni legas pri teatro, kino kaj muziko. *Literatura Foiro* estas kultur-politika revuo: la legantoj ĝuas artikolojn pri interlingvistiko, historio, sociologio, filozofio,

fojfoje eĉ pri religio. *Literatura Foiro* estas unu el la plej gravaj opinikreaĵoj: ĝi ofte analizas la procezojn en Esperantio, sur ĝiaj paĝoj pasas gravaj debatoj pri nia lingvo kaj komunumo. Unufraze, *Literatura Foiro* ludas avangardan rolon en Esperantio. La problemoj por la revuo venas ĉefe de la altiĝantaj poŝtaj tarifoj.

2. La abonanto-nombro de *Literatura Foiro* restas stabila dum la lastaj kelkaj jaroj, malgraŭ la malfacilaĵoj. Konkrete pri la ciferoj tamen povus respondi la eldonisto. Nian revuon ricevas ankaŭ preskaŭ cent PEN-Centroj (fakte la Esperanta estas unu el la malmultaj PEN-centroj, kiuj povus fieri per tiom bonkvalita kaj interesa periodaĵo) kaj tio igis nin ĉi-jare sur la dorso de la kovrilo resumi la enhavon de la numero kaj informi pri aliaj gravaj kulturaj esperantaj eventoj en la tri oficialaj lingvoj de PEN Internacia — la franca, angla kaj hispana.

3. Bedaŭrinde, la pasinta jaro alportis malbonajn novaĵojn por la esperanta gazetaro: ne plu aperos *Rok’Gazet*, definitive ĉesis *Fonto*. Laŭ mia superrigardo, la movadaj gazetoj spertas problemojn pro la rapidaj interŝanĝoj de informoj per la novaj teknologioj, pro la altiĝantaj poŝtaj tarifoj kaj produkto-kostoj, pro la maljuniĝo de generacio, kies informkanalo estis ĉefe la gazetoj. Rimarkendas ke la problemoj pri la informkanaloj trafis ankaŭ radiostaciojn kaj televidon, kiuj elsendis en esperanto. Samtempe tiun niĉon transprenis la podkasto, per la novaj teknologioj. Necesas momenta “foto” de la esperantaj amaskomunikiloj por analizi la situacion kaj marki la vojon de ĝia plua evoluo. *La Ondo de Esperanto* komencas fari la unuan paŝon por tio per siaj statistikoj kaj ĉi tiu enketo, aŭ rinda tablo, kun redaktoroj de esperantaj periodaĵoj.

4. Varia enhavo; bedaŭrinde en 2007 mankas la kalendaro de jubileoj kaj datrevenoj, kaj ĝi estas utila al la anoj de la komunumo por koni sian esperantistan identecon.



Kontakto. Soci-kultura revuo de TEJO eldonata de UEA; aperas 6-foje jare sur 16 paĝoj; administra de la CO de UEA en Roterdamo, redaktata (nun) en Usono kaj presata en Pollando. Individuaj membroj kaj patronoj de TEJO ricevas *Kontakton* aŭtomate, sed eblas ankaŭ aboni. Blinduloj povas ricevi voĉlegitan kasedan eldonon senpage.

Respondas Eugenia Amis (redaktoro, sur la foto kun sia edzo Joel)

1. *Kontakto* estas junuleca soci-kultura revuo, kiu traktas ĉiujn aktualaĵojn, interesajn al esperantistoj (aparte al junuloj). Ofte la legantoj mem proponas temojn, kiuj interesas ilin. Kvankam *Kontakto* ne estas revuo pri la Movado, tie tamen foje publikigas artikolojn pri la temoj, kiuj aparte interesas esperantistojn, kiel denaskismo, Pasporta Servo ktp. Aldone, *Kontakto* estas aparte celata por instruistoj kaj komencantoj: parto de la artikoloj aperas en la lingvaĵoj “facila” kaj “tre facila”, kun limigita kvanto de radikoj kaj kun pli facila gramatiko.

Inter la temoj, kiujn *Kontakto* tuŝis lastatempe, estis Tutmondiĝo, Amo, Lingvoj, Bestaj Rajtoj, Egalaj Rajtoj kaj Mitoj.

Ekde 2006 kolora versio de *Kontakto* haveblas interrete por la abonantoj kaj membroj de TEJO. Ni lastatempe ekhavis kelkajn novajn aŭtorojn en la landoj, kie ni ĝis nun ne havis kontribuantojn — kiel Afganio.

Bedaŭrinde, pro la surfaca sendado de la revuo, en iuj landoj (aparte en Amerikoj) oni ricevas *Kontakton* plurajn monatojn pli malfrue ol en Eŭropo, sed sendado per aerpoŝto estus tro multekosta kaj komplika de la administra vidpunkto...

2. La kutima preskvanto de *Kontakto* en la pasintaj jaroj estis 1100 ekz. La ĝenerala preskvanto restas stabila en la pasintaj jaroj: ekde 2002 estis ioma kresko de la individuaj abonantoj (tre ĝojiga fakto por ni!), tamen, la kvanto de la kolektivaj abonantoj, bedaŭrinde, iom falis pro la monproblemoj de kelkaj landaj asocioj. Plej multaj abonantoj estas en Francio (95), Hispanio (83), Germanio (65), Brazilo (63) kaj Usono (48).

3. Kiam mi faras prelegojn pri Esperanto, mi kutime mencias la grandan kvanton de gazetoj kaj revuoj en Esperantujo, ja multegaj landaj asocioj kaj junularaj sekcioj eldonas siajn revuojn kaj revuetojn — eĉ sen menciigi multajn internaciajn E-eldonaĵojn. Multaj revuoj de la landaj asocioj estas



tre altkvalitaj lingvaĵe, stile kaj aspekte, kaj ankaŭ interesaj por la ekstera publiko, kaj mi sincere ŝatas legi aŭ simple trarigardi ilin por ekscii, kio okazas en la E-movado de diversaj landoj (kompreneble, ne ĉiuj E-eldonaĵoj estas idealaj de la lingva vidpunkto). Bonŝance, esperantistoj estas pli verkemaj (kaj legemaj) ol neesperantistoj, kaj tio kontribuas al la kvanto kaj diverseco de la revuoj en Esperantujo.

La ĉefa problemo de la E-gazetaro, laŭ mi, estas la sama, kiun spertas landaj asocioj: malgraŭ tio, ke la kvanto de esperantistoj en la mondo daŭre kreskas pro la disvolviĝo de la interreto, la kvanto de membroj en multaj asocioj falas: multaj homoj lernas Esperanton rete, korespondas kun aliaj esperantistoj — kaj ne strebas aliĝi al la organizoj kaj/aŭ aboni paperajn revuojn. Krome, multaj (aparte junaj) homoj preferas interreton al la paperaj revuoj.

Tamen mi pensas, ke la stato de E-gazetaro en la proksima estonteco ne multe ŝanĝiĝos: mi ne kredas, ke pro la disvolviĝo de la retaj teknologioj la paperaj revuoj tute aŭ preskaŭ tute malaperos — ja iam oni eĉ diris (kaj kredis), ke pro la disvolviĝo de la televido malaperos libroj. Mi kredas, ke multaj homoj daŭre preferos legi paperajn revuojn, kiujn oni povas legi en la trajno, porti al la laborejo, montri al la kolegoj kaj uzi dum la ĉeestaj kursoj.

4. Mi ŝatas ĝin!



Mi legas “La Ondon” ...

... ĉar mi trovis abundan materialon, uzeblan por fakaj celoj. Oni ne povas ne rimarki la kompetentecon de la redakcio. Mi aparte bonvenigas la kontribuojn de rusaj intelektuloj.

Detlev Blanke (Germanio)

... ĉar en ĝi: (1) estas freŝaj informoj pri la okazintaj E-aranĝoj en la tuta mondo; (2) estas prezentata tribuneno por ĉiaj eldiroj; (3) sur la 3a paĝo ĉiam estas intervjuo kun iu fama persono aŭ kolektivo; (4) ofte estas publikigitaj opinioj de Komitatano Z.

Bronislav Ĉupin (Ruslando)

... ĉar la rusoj estas grava kaj nemalhavebla popolo inter la eŭropaj popoloj. Cetere, precipe pro jenjenaj intereseĝaj artikoloj pri (inter)lingvistiko, Esperanto aŭ literaturo.

Christian Declerck (Belgio)

... ĉar ĝi estas riĉenhava kun interesaj artikoloj, kaj ankaŭ ĉar mi verkas en la muzika rubriko ;-)

plej muzike
Flo! (Francio)

Kun granda plezuro mi konstatas, ke *La Ondo de Esperanto* estas unu el la plej interesaj revuoj en la Esperanta mondo. Ĉiam interesaj artikoloj kaj informoj pri nia movado, bona lingvonivelo, partoj en kiuj ĉiu trovas ion interesan por si. Mi pensas ke, tenante “tiun vojon”, Vi atingos ne nur 150 numerojn, sed 1500.

Stanisław Mandrak (Pollando)

... ĉar ĝi rilatas ekvilibre al la diversaj tendencoj en la Esperantomondeto.

Gary Mickle (Germanio)

... ĉar ĝi enhavas interesajn intervjuojn kaj informajn artikolojn. Kvankam multajn informojn mi ricevas ankaŭ alimaniere (rete), mi ŝatas legi bone elektitan kaj ekvilibran novaĵkolekton pri esperantlingva movado kaj komunumo. Ankaŭ beletraj materialoj de *La Ondo* estas ĉiam interesaj.


Jukka Pietiläinen (Finnlando)

... ĉar: (1) Ĝi raportas pri la okazintaĵoj en la Esperanto-movado koncize kaj interesamane. Tiu temo ĉiam interesas min. (2) Ĝi estas neŭtrala kaj esprimas opiniojn de la diversaj movadaj “tendaroj”.

Josi Ŝemer (Israelo)

Kial mi legas «La Ondon»?

Ĉiam pli kaj pli interesa kaj belaspekta



La Ondo, eldonata en Ruslando, estas parto de nia Esperantujo. En ĝi estas ĉiam multaj informoj rilate al la movado kaj pri larĝsenca kulturo. Sed, laŭ mia opinio, la plej vigla kaj moderna primovada gazeto estis jam ne ekzistanta *Eventoj*. Eĉ la oficiala revuo *Esperanto* ne povas esti tiel ĉiufanka, kiel estis la eldonata en Hungario memoriganta gazeto.

LOdE havas sian firman lokon en la Esperanto-gazetaro kaj estas ĉiam pli kaj pli interesa kaj belaspekta, kvankam en ĝi mankas al mi humuro. Malgraŭ tio, ke seriozeco de geesperantistoj estas famega, mi esperas, ke ne nur mi volus legi pli multe da gajaj kaj spritaj tekstoj (nur la francdevena *La KancerKliniko* estas, bedaŭrinde, tro malmulte), kaj vidi pli multe da belaj, koloraj, primovadaj fotoj. Krom la titol- kaj dorspaĝo nur la dua paĝo de la revuo kaj la antaŭlasta paĝo povas esti uzataj tiucele sed ne por tekstoj. Teksto povas aperi sur ĉiu alia paĝo; *Nia filmo*, kiu iam aperis sur la 2a paĝo de *Heroldo de Esperanto*, estis spektinda por multaj.

Laste malaperis Esperantaj disaŭdigoj en la Pola Radio kaj la revuo *Oomoto*. Mi ankaŭ timas je la sorto de nia *LOdE*. Mi scias pri grava malsano de la eldonist(in)o — Halina Gorecka, kiu devas havi operacion; sed sen mono ŝi certe ne estos operaciita, ĉar profito pro eldonado de la Esperanto-revuo kaj Esperanto-libroj (ununura profito de la familio) ne sufiĉos por pagi la operacion. Ĉu ekzistas aliloke familio, kiu vivtenas sin nur dank' al Esperanto?

Mi konstatas tion kun bedaŭro... Mi eĉ ne scias, ĉu la ĉefredaktoro permesos aperigi ĉi leteron, sed mi devis skribi ĝin.

Marian Zdankowski (Pollando)

Sen *La Ondo* mankus multo

Mi iom senpacience atendas, esperas... vian revuon, kiu aperas regule. Verdire, preskaŭ ĉio plaĉas al mi. Laŭ mi ĝi estas, kiel dirite ĉe la unua paĝo, vera “Internacia sendependa magazino en Esperanto”: ĝi raportas pri Esperanto-okazintaĵoj en la tuta mondo, la Esperanto-movado, la lingvaj aspektoj (aŭ problemoj), ankaŭ la eŭropaj, la literaturaj, ktp, neforgesante la plezuron solvi la kutimajn “enigmojn”!

Tre plaĉas al mi la konstanta zorgo de la redakcio *informi*, ne *polemiki* akrege kaj aĉe; ĉiuj legantoj per si mem kapablas forĝi sian propran opinion ...

Unuvorte, sen *La Ondo*, mankus **multo!**

Jackie Huberdeau (Francio)



Unu el la plej elstaraj

Ĉiam plaĉas al mi la enhavo, dum la aspekto eĉ pliboniĝis konsiderinde lasttempe (Ĉu miaj okuloj trompas min, ke la fotoj estas pli fajnaj? Almenaŭ la tutkolora kovrilo ankaŭ interne estas alloga, mi ĉiam kunportas ekzempleron por montri dum hazardaj vizitoj en najbaraj kluboj — ĵus nun mi revenas de tia vizito en Villingen/Nigra Arbaro).

Persone ravas min la *Vortoj de komitatano Z* — aŭdace foje, sed ĉiam ŝajne bone informita li/ŝi donas interesajn enigardojn en internaĵojn aŭ momentajn humorojn.

Belaj estas la raportoj de aranĝoj, sed ne mankas pli klerigaj artikoloj pri la lingvo, recenzoj aŭ novaĵoj.

Ĉu vi eble enkonduku rubrikon raportoj pri/el fakaj asocioj? Min interesus: kio okazas ĉe la skoltoj, kiu konsistigas la Katan Rondon, pri kio diskutas nefumantoj? Ĝuste la apliko de Esperanto en la fakasocioj, sed ankaŭ de malantaŭ la kulisoj certe estus edife — kaj se neniu tro insiste liveras materialon, eble indus explore prezenti ilin? Kie okazis fruktedona kunlaboro kun ne-/eksteresperantaj asocioj kiel la Ruĝa Kruco, Amnestio Internacia, Aŭtomobilkluboj ktp. — estas ege vasta pensebla gamo de interagoj kun la “ekstera” mondo. Kaj anguleto pri lokaj grupoj, landaj asocioj (historio, evoluo, elstaraj personoj...), ĝemelaj urboj.

Kial mi do legas la *Ondon*? Simple, ĉar ĝi estas unu el la plej elstaraj revuoj, kun interesa kaj foje profunda miksaĵo de temoj por multaj gustoj, tamen ne tro plata.

Por la estonteco mi deziras al vi kaj la helpantoj plian forton daŭrigi kaj plievoluigi la gazeton.

Jubileajn salutojn el suda Germanio!

Robert Bogenschneider (Germanio)

Ĝenerala kaj neoficiala



Ne mankas revuoj, gazetoj, magazinoj en Esperantio. Tamen ĉiu havas sian propran karakteron, propran legantaron. Laŭ mi, la speciala eco de *La Ondo* estas ke ĝi estas *ĝenerala*, t.e. ne fakeca, magazino kaj *neoficiala*.

Vivu la periodaĵoj por poŝtmarko-kolektantoj, interlingvistoj, biciklistoj kaj similaj, sed ni bezonas ankaŭ revuojn kiuj pritraktas tutan gamon da temoj, de literaturo tra vojaĝado al esperantumado. *Monato* kaj *La Ondo* perfekte komplementas unu la alian. *Monato* pritraktas la mondon ekster la esperanta komunumo, dum *La Ondo* pritraktas la tutmondan esperantan komunumon, ĝiajn variajn aktivojn kaj problemojn. Ĝi krome ne hezitas kritiki kiam bezonatas kritiko. Bone.

Mi varme gratulas la redakcion de *La Ondo* pro la konstanta plibonigo de la revuo trans la jaroj, precipe pro la belegaj fotografiaĵoj. Mi deziras al ili kaj al la revuo mem, longan vivon kaj gloran estonton!

David Kelso (Britio)

En la nova Urba Biblioteko de Turku: Jorma Ahomäki (dekstre) kaj bibliotekisto (kun la marta *Ondo* en la manoj) antaŭ gazet-stando. (Fotis Mikko Mäkitalo)

Agrabla demando

Kial mi legas *La Ondon*? Por tio estas kelkaj kaŭzoj.

1. Ĉar en Ukrainio simila Esperanto-revuo ne ekzistas.
2. Ĉar *La Ondo* estas enhavoriĉa, interesa, bone ilustrita.
3. Por ĉiu homo dezirindas koni la klasikajn verkojn. En *La Ondo* ili aperas en Esperanto kaj eblas samtempe ekzerci la lingvon kaj rememori aŭ konatiĝi kun la klasikaĵoj. Do, estas duobla utilo!
4. Por havi eblon esprimi sian dankemon al la karaj redakcianoj kaj kunlaborantoj, kion mi tuj faros.

*Ne bezonas ni la oron,
nek la sangon, nek doloron,
ĉar ekzistas en la mondo
Amo kaj Konkordo!*

*Tial ĝoje mi admonas
ke ja bela liro Via
sciojn kaj la sentojn donas...
Sonu l' voĉo melodia!*

*Ĝoje spertas mi admiron
vidi en agado Via
la sukcesojn kaj inspiron.
Helpu la favoro Dia!*

Grigorij Berezin (Ukrainio)

La plej bona sendependa revuo



Mi legas la *Ondon*, ĉar ĝi estas la plej bona sendependa revuo pri ĉio, kio okazas en la esperantista mondo. Mi opinias, ke la informoj pri la agado de esperantistaj organizaĵoj kaj la internaj problemoj de unu el ili (UEA) okupas tro grandan spacon. Mi preferas artikolojn kun beletra kaj socikultura enhavo kaj juĝas la recenzojn aparte grava parto de tia revuo.

Ne kompromisu kun tiuj, kies mensogaj alvokoj al “neŭtraleco” fontas fakte el ilia naciismo kaj fideleco al ŝtato. Sendependeco signifas ankaŭ esprimliberecon. Ĉi-rilate mi ege ĝuis en la marta numero (pĝ. 9) la jenan informon: “Pola registaro havis nenion komunan kun la polica persekuto al geja manifestacio en Poznań”. Registaro, kiu havas “nenion komunan” kun la agoj de sia polico — jen supera formo de pola nigra humuro.

Longan vivon al *La Ondo*, kiu simbole asertas, ke ĝi naskiĝis en 1909 kaj do transvivis multajn ŝtatojn, kaj kiu nun aperadas en la plej absurda parto de la Ruslanda Federacio!

Michel Duc Goninaz (Francio)



Inter popoloj kaj kulturoj

En 2002 Aleksandro Korjenkov prelegvizitis Finnlandon. Survoje li haltis en Turku, kie li rakontis pri Esperanta literaturo kaj pri *La Ondo*. La prezentado kaptis kaj konkeris min. Tuj mi aĉetis la konatan verkon *Malvivaj animoj* kaj abonis la prestiĝan revuon, eldonatan en Kaliningrado, kies entuziasma leganto mi jam estas kvin jarojn — kaj estos, se Pli Alta Forto subtenos mian propran decidon.

Telegramstile mi varme gratulas okaze de la 150a numero. Iom post iom plifortiĝis mia ligiteco al ĉi tiu sendependa publikajo. Multflanka ĉiam estas ĝia enhavo. Novaĵoj abundas el la tuta mondo. Daŭre mi sopiras al pensoriĉaj cerbumaĵoj de Alen Kris kaj atendas kolorajn intervjuojn de korigoj kaj ordinaraĵoj movadanoj. Carlo Minnaja bele pentris recenzon pri la *Lingvo kaj popolo* de Humphrey Tonkin. Agrable estas rideti ĉe plukaĵoj de István Ertl. Varia kaj pozitive buntkolora enhavo, en kiu oni donas spacon ankaŭ al ekstremaj opinioj, plivigligas legemon. Tute vane aldoni — sed tamen mi ripetis — *La Ondo* ege plaĉas al mi.

En la komenco de marto 2007 mi estis en la ĵus inaŭgurita, nova Urba Biblioteko de Turku. Estis al mi malfacile en la giganta librejo trovi la Esperantajn gazetojn. Oficisto ĝentile helpis kaj klarigis: “Ni havas kelkajn ĉefajn sekciojn por gazetoj kaj revuoj. Esperanton oni trovas sub la rubriko *Popoloj kaj Kulturoj*”. Ridetante mi dankis pro la konsiloj. Iam kaj tiam ankoraŭ nuntempe iuj eksteruloj plendas pro tio, ke Esperanto ne posedas landon nek kulturon. Tuj mi rimarkis surbrete okulfrapan, koloran kovrilpaĝon de *La Ondo* (la 149a numero!) inter kelkaj aliaj periodaĵoj en la Zamenhofa lingvo. Nun ni scias, ke en Turku nia prestiĝa revuo el Kaliningrado ricevis honorlokon inter “popoloj kaj kulturoj”! Prosperon ankaŭ estontece.

Jorma Ahomäki (Finnlando)

Senpartia en la ĝangalo

Mi legas *La Ondon*, ĉar ĝi fontas el la tradicio de rusaj intelektuloj, al kiu la Esperanto-movado multan dankon ŝuldas. Oni rekonas en ĝi la deziron esti lojala al la Zamenhofa inspiro, klerigi la legantojn kaj esti senpartia en la ĝangalo de konfliktemaj esperantistoj.

Por mi kiel okcident-eŭropano ankaŭ konsideriĝas, ke mi ŝatas pli intime konatiĝi kun parto de Eŭropo, kiu estas malpli sinsufiĉema, malpli “evoluinta”, malpli (sencie) aroga ol la nord-atlantika vivosfero.

Johan Derks (Nederlando)



Beletra Almanako, aŭ legado sub palmoj

La eldonejo *Mondial* en Novjorko planas literaturan eldonaĵon kun la nomo *Beletra Almanako*, kiu aperu almenaŭ unufoje jare. Ni intervjuas la ĉefredaktoron de BA, Jorge Camacho.

Ĉu tiu nomo ne sonas eksmoda? Mi citu PIV pri almanako: “Libreto, entenanta kalendaron, astronomiajn sciigojn por la kuranta jaro, veterantaŭdirojn kaj aliajn diversajn informojn, ofte kun distra parto”. Ĉu do kunlaboros Wandel pri astroj, Long pri vetero kaj f-ino Barlaston pri distra parto?

La difino en PIV tro striktas. Jam la indiko pri eteco limigas la signifon al malvasta grupo de publikaĵoj. En la historio ekzistis ĉiaj almanakoj, ankaŭ beletraj, kiel la Almanako de la Muzoj. Distingon faras la neregula, sendeviga aperitmo: kiam ni havos materialon por nova numero, tiam ĝi aperu, sen devo remburi paĝojn per manifestoj kaj umbilikismaj komunikoj. Alia trajto: la libreco, t.e. ĝi aperos ne kajere sed libroforme. Cetere, ĉiaj kontribuoj bonvenas, inkluzive de fotoj, desegnoj kaj komiksoj, unuflanke ĉar ankaŭ la vorton “beletra” oni komprenu libere, kaj aliflanke ĉar tiel BA estos ankaŭ ia Almanako de l’ Amuzoj, ne tiom serioza kaj morna. Kurioze, la vorto “almanako” etimologie signifas “haltejo de kameloj”: haltejo por mildigi la soifon kaj rigardi senhaste la stelojn.

Sed eble la fakto ke temas ne pri monata aŭ sezona eldonaĵo montras ke ne ekzistas bezono en la merkato. Beletro aperas en *Fonto*, *Literatura Foiro*, *La Ondo* mem, *La Gazeto*... kaj homoj publikigas simple en la reto...

La reto, ĝis nun, ne povas malfari la homan ŝaton legi tekstojn sur papero. La kontrasto kuŝas ne inter presaĵoj kaj retaĵoj, sed inter informoj legeblaj (t.e. skribitaj) kaj aŭdvidaj. Ja la senfineco de repaĝoj similas tiun de papirusaj ruloj. Facilas publikigi en la reto, ekzemple bloge, sed tiaj tekstoj virtuales, kaj konas ilin nur la verkinto kaj lia rondeto. Rilate la Esperanto-merkaton, ĝi ne favorus la kunekziston de plia (du)monata kajera revuo, eĉ post la ĉeso de *Fonto*. Fakte neniu el la aliaj

menciitaj publikaĵoj estas unuavice aŭ grandparte beletra. Multaj esprimis lastatempe deziron je nova literatura revuo, same legemuloj kiel verkistoj. Ni esperas ke ilin altiros la libra formato.

BA interkonsentis kun UEA pri premiera aperigo de premiitaĵoj el Belartaj Konkursoj. Ĉu de ĉiuj premiitaj verkoj, eĉ se la nivelo laŭ la redakcio ne taŭgus? Plue, ĉu tiu ligiteco al UEA ne kompromitus la vastecon de la redakta horizonto?

Temas pri interkonsento inter *Mondial* kaj UEA, en kiu la redakta teamo rolas marĝene. Se iuj premiitaĵoj montriĝus netaŭgaj, ni esplorus la situacion; foje premiigis eseoj kun lingvaj eraroj, kaj la literatura nivelo ne ĉiam brilis (tamen nenio komparebla kun la skandale manipolitaj Floraj Ludoj aŭ la Verko de la Jaro!). BK subtenindas kiel aperejo de novaj talentoj, al kiuj tre gravas la baldaŭa publikigo en revuo sencenzura, sendogma kaj senklika. La celo ja estas vigligi la stagnajn akvojn de nia kulturo.

Kunredaktas kun vi Probal Daŝgupta kaj István Ertl. Kiel tiu kunlaboro okazas en la praktiko?

En la praktiko ni korespondas pri verkoj ricev-itaj, -otaj, -indaj kaj pri tiuj, kiujn necesas poluri aŭ forrifuzi. Ni intermesaĝas pri ĉiaj ideoj, ĉar temas pri nova projekto, nun en fazo ne embria sed jam feta, kiu konstante evoluas. Ni ĉiuj havas okupojn en niaj privataj vivoj, tamen la afero prosperas.

Ĉu havas apartan gravecon ke la realigantoj venas el kvar landoj kaj tri kontinentoj?

Nenian. Temas pri hazardo. Mi kontaktis amikojn konatajn pro altkvalita kontribuado al la esperantaj literaturo kaj kultura vivo en diversaj kampoj, kaj ili akceptis. Sed mi ne aparte penis varbi personojn de difinita urbo, aĝo, harkoloro aŭ signo de la ĉina zodiako.

Kiaj estas viaj kriterioj por akcepti tekston?

Ni akceptos tekstojn legindajn, interesajn, valorajn, laŭ kriterioj neeviteble subjektivaj. BA defendas nenian pseŭdoideologion, nek elitisman koncepton de literaturo. Ni celas sproni verkemulojn kaj tradukemulojn, proponante oazeton por iliaj verkoj.

Kion pri originalaĵoj, tradukoj?

Ĉar originaleco ne garantias kvaliton, ne gravas al ni ĉu temas pri originaloj aŭ tradukoj, kondiĉe ke la verkoj valoras kaj, se eble, montriĝas novecaj laŭ la stilo aŭ karaktero (kaj sen problemoj pri kopi-rajtoj).

Ĉu beletreco estos strikta kriterio, aŭ okaze aperos ankaŭ nebeletraj tekstoj?

Beletreco estos gvida kriterio, sed ne la sola nek la plej grava. Ankaŭ verkoj pribeletraj havos lokon en BA, ĉefe kritikoj kaj recenzoj. Eĉ la rubriko *Leteroj* ne mankos.

Ĉu Vi jam havas sufiĉan materialon por ekaperi?

Ni jam havas materialon ne nur por la unua “boao” (BA1) sed ankaŭ por parto de la dua.

Kiam aperos la unua numero?

Laŭplane en septembro, post la UK, por ke ĝi enhavu la verkojn premiitajn en la Belartaj Konkursoj.

Ĉu eblas aboni la almanakon?

Ĉiu numero estos libro, kun po inter 120 kaj 160 paĝoj, kiun eblos antaŭmendi ĉe la repaĝo de *Mondial* (www.librejo.com), aŭ mendi poste, kiam ajn, de la eldonejo aŭ de diversaj libroservoj, aŭ pere de la retbutiko *Amazon* (kiel jam okazas pri ĉiuj eldonaĵoj de *Mondial*), aŭ aĉeti ĝin rekte en renkontiĝoj. Ĝis elĉerpiĝo, ĉiuj numeroj de BA restos daŭre aĉeteblaj, mendeblaj, donaceblaj...

Ĉu ekzistos ankaŭ reta versio?

Probable ne. Malmultaj homoj legus tutan verkon sur ekrano, aŭ printe, se eblas legi ĝin kiel libron ne nur enhance sed ankaŭ grafike altkvalitan. Sed eble aperos en la reto indeksoj aŭ enhavtabeloj por la diversaj numeroj.

Kvin komitatanoj B elektitaj

Kvin kandidatoj sin anoncis por la elektado de komitatanoj B, kiuj reprezentas la individuajn membrojn en la supera organo de UEA. Ĉar fine de la jaro 2006 la individuaj membroj de UEA nombris pli ol 6000, povis esti elektotaj sep komitatanoj B. Ĝis la limdato, la 28a de februaro, liveris kompletajn dokumentojn kvin kandidatoj. Sekve ili estas aŭtomate elektitaj kaj poŝta voĉdonado de membroj ne estas bezonata.

La kvin komitatanoj B, kies oficperiodo komenciĝos je la unua tago de la 92a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo, estas Marija Beloŝević (Kroatio), Tomasz Chmielik (Pollando), Johan Derks (Nederlando), István Ertl (Luksemburgio) kaj Jukka Pietiläinen (Finlando). Beloŝević, Ertl kaj Pietiläinen membras ankaŭ en la nuna Komitato elektita en 2004. Chmielik kaj Derks eniros la Komitaton kiel novaj membroj.

Marija Beloŝević (naskiĝis en 1965) estas konata i.a. kiel longtempa aktivulo kaj estrarano de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.

Tomasz Chmielik (1957) estas aktiva eldonisto kaj estrarano de Esperantlingva Verkista Asocio.

Johan Derks (1940) aktivis i.a. pri eŭropa agado kaj estis estrarano de Eŭropa Esperanto-Unio.

István Ertl (1965) estas Esperanta verkisto kaj tradukisto kaj laboris dek jarojn kiel redaktoro de la revuo *Esperanto*.

D-ro Jukka Pietiläinen (1966) funkciis kiel prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando kaj lastatempe kiel komisiito de UEA pri informado.

Laste la komitatanoj B estis elektitaj sen poŝta balotado en 1992. Kvantkam en la antaŭa jaro UEA havis pli ol 8000 individuajn membrojn, unuafajo de 60 jaroj, por naŭ lokoj de komitatanoj B anonciĝis nur ok kandidatoj. En kvar postaj fojoj okazis balotoj, en kiuj partoprenis 30–33% de la individuaj membroj. Pri la ses lokoj de komitatanoj B en la nun deĵoranta Komitato konkursis antaŭ tri jaroj 16 kandidatoj. Voĉdonis tiam 1491 membroj, t.e. 31,4%.

GK UEA

LOdE. Ĉiuj novelektitaj komitatanoj estas niaj legantoj. Ni deziras al ili fruktodonan laboron en la Komitato!



Survoje al Jokohamo

Ĝis nun aliĝis al la UK 1458 el 53 landoj, el kiuj 817 estas el Japanio. LKK celas 1000 aliĝintojn el Japanio. Inter la 817 aliĝintoj pli ol 200 anoncis sin helpantoj por la UK. LKK uzas la vorton “helpanto” anstataŭ la kutima “volontulo”. Ĉar ankaŭ LKK-anoj mem estas volontuloj, LKK nomis volontulojn ekster LKK “helpantoj”.

Ne okazos aparta “Interkona Vespere” kun muziko kaj danco, ĉar kongresanoj volas vere interkoni sin senĝene. Muzikon kaj dancon servas aliaj eroj, ekzemple Koncerto kaj Balo. Movada Foiro mem estas Interkona Vespere, kie kongresanoj povos trovi novajn kaj malnovajn amikojn, kune babilu, foirumi, movadumi, amikumi kun eĉ nesperantistoj, ĉar la programero estos malfermata ankaŭ al publiko. Tiam se vi bezonos interpretiston, bonvolu peti japanajn helpantojn interpreti. Ĝi okazos 4 aŭg (sabate) vespere tuj post Komitata Kunsido de UEA en la sama salono Hodler.

Tahira Masako

UEA, ioma malkresko

UEA spertis ioman malkreskon de sia membraro en 2006, kiam ĝi registris 6066 individuajn kaj 11732 aligitajn membrojn. En 2005 estis respektive 6107 kaj 12253. Estis entute 17798 membroj en 117 landoj, dum en 2005 — 18360 membroj en 113 landoj.

La junaj membroj de UEA samtempe apartenas al la junulara sekcio TEJO, kiu pasintjare havis 515 individuajn (533 en 2005) kaj 1979 (2074) aligitajn membrojn.

La revuo *Esperanto* havis 4089 pagitajn abonojn, t.e. 5 pli ol en 2005. La nombro de pagitaj abonoj de la junulara revuo *Kontakto* estis 893 (-29).

Laŭlanda statistiko de la membraro de UEA aperas en la aprila numero de “Esperanto”.

GK UEA

LOdE. Pro manko de loko ni aperigos pli detalajn informojn venont-kajere.

Lingvo-politiko de Slovakio

22 feb kunsidis en Bratislava la 9a laborgrupo de la Nacia Konvento pri EU. Ĝi havis nur unu kernan program-punkton — diskuton pri propono de la dokumento “Elirpunktoj de la lingvo-politika strategio de Slovaka Respubliko kiel membro-ŝtato de EU”. La dokumento estas faka studaĵo kaj ĝi estis prezentita far Eva Poláková, kiu estis unu el la kunaŭtoroj kaj redaktoro de la dokumento.

La dokumento estas dividita je du partoj (a) Ekstera lingvo-politiko de Slovakio, kaj (b) Interna lingvo-politiko de Slovakio.

La diskuto estis ege vigla kaj same utila. Esperantajn organizojn reprezentis Ján Vajs (SKEF) kaj Peter Baláž (SKEJ). La dokumento estas la unua ĉi-tema oficiala dokumento (ellaborita laŭ peto de Ministerio de eksterlandaj aferoj de Slovakio) de membroŝtato de EU. Samgravaj estas ankaŭ kelkaj konkludoj kaj rekomendoj, ekzemple, “enkonduki por altlernejoj studeblojn de la latina kaj Esperanto” kaj “en la stud-programojn de la lingvo-preparo enkonduki kursojn de eksperimenta lingva edukado per uzo de la propedeŭtika lingva modelo”...

Ne ĉiuj ĉeestintoj reagis pozitive pri similaj proponoj — multaj ŝatus vidi la venkon de la angla laŭeble plej frue. Tamen tia solvo eĉ pure de la politika vidpunkto ne estas plenumbla. Ankaŭ pro tio bonas similaj diskutoj, kiu okazis dank’ al iniciato de la 9a laborgrupo de Nacia konvento pri EU. Renkontiĝoj donas spacon por ne nur prezenti propran vidpunkton kaj solvon, sed ankaŭ aŭskulti aliulojn — kaj eventuale veni al kompromiso, kiu estus akceptebla por ĉiuj.

Kiel skribiĝas rekte en la enkonduko de la dokumento: “En la proponataj rekomendoj respeguliĝas diversaj alternativoj. La studaĵo servu ja kiel bazo de pluaj fakaj diskutoj, kaj tiujn plej bone elvokos netradiciaj aliroj kaj diversaj vidpunktoj ĉi-problemaraj”.

Ĉefa merito en ekapero de la studaĵo kaj ĝia diskuto apartenas al Jozef Reivart, kiu du jarojn gvidis la grupon kaj estis ĝia motoro. Nun, post lia eksterlandiĝo labora, transprenis la taskon lia koleginino Zuzana Chudá. Ni esperu, ke ŝi samlerte kaj entuziasme gvidos la grupon kaj antaŭenigos la diskuton pri la lingvo-politiko en EU.

Peter Baláž

(Laŭ *Eŭropa Bulteno*)



Unuafoje LF en Peterburgo

La unua Peterburga Lingva Festivalo okazis 4 mar 2007 en la jura fakultato de la Sankt-Peterburga Ŝtata Agrikultura Universitato, kelkajn metrojn for de la imperiestra palaco en Puŝkin, suda apudurbo de Sankt-Peterburgo.

Kerno de la festivalo estas paralelaj duonhoraj lecionoj-prezentoj de diversaj lingvoj: tiel partoprenantoj ĉiam havas elekton, kun kiu lingvo konatiĝi, kaj vizitas dum unu tago kelkajn tiajn prezentojn. La specifaĵo de la Peterburga festivalo iĝis prezento de lingvosciencaj branĉoj apud la lecionetoj de lingvoj: estis prezentitaj kvin sciencaj branĉoj kaj 22 lingvoj.

Ĉeestis pli ol cent partoprenantoj, el kiuj 71 plenigis enketilon. Laŭ la enketiloj, partoprenintoj multe ŝatis la eventon. Furoris prezentoj de la japana kaj la korea, pli ol duono da neesperantistaj festivalanoj vizitis prezenton de Esperanto.

Speciala internacia koncerto, kutima en aliaj lingvaj festivaloj, ne okazis, kvankam la solenan fermon kronis, tute spontanee, irlanda danco.

Lokaj amaskomunikiloj informis pri la evento. Inter ili renoma tagjurnalo *Delovoj Peterburg* kaj la plej populara studenta semajngazeto *Gau-deamus*.

Slavik Ivanov

Ne nur kongresi kaj festivali

Malgraŭ multaj zorgoj pri la lingva Festivalo kaj REK-EoLA peterburgaj esperantistoj lastatempe partoprenis ankaŭ en aliaj projektoj ne rekte ligitaj kun Esperanto.

Dum unu marta semajno oni konferencis ĉe la filologia fakultato de la Sankt-Peterburga Ŝtata Universitato.

En la sociolingvistika sekcio Oksana Burkina prezentis raporton pri internacia fonologio. Tri internaciaj sistemoj estis komparataj — tiuj de la klasika fonologo Trubeckoj, de la angla internacia lingvo kaj de Esperanto. La raporton sekvis interesa diskuto. La konferenca materialo estos eldonita ruslingve.

Ruslanda televidkompanio *Mir* (Mondo), kiu atingas ankaŭ aliajn landojn, preparas filmon pri planlingvoj. La projekto kovros temaron de universalaj planlingvoj (Esperanto), beletraj lingvoprojektoj (ekzemple, Quenya de Tolkien) kaj filozofiaj (ekzemple, tokipono). Por intervjuo pri Esperanto estis invitita Slavik Ivanov. Ankaŭ estis filmita viva interparolo en Esperanto inter Slavik Ivanov kaj Oksana Burkina, kiu en la filmo havos rusajn subtitojn.

Oksana Burkina

Fervojista skisemajno

En sunbrila kaj amika etoso okazis en Azuga (Rumanio) la 48a Internacia Fervojista E-Semajno (IFES), kiun modele aranĝis vicĉefkomitatano de Internacia Fervojista E-federacio (IFEFF), Rodica Todor.

Partoprenantoj el kvin landoj ĝuis specifan programon, kiu konsideris ĉefe la inklinton de la grupo. Diskutata estis — kaj ankoraŭ devos daŭri — ĉu IFES povos resti en la origina formo. En Azuga tio estis bone solvita, ne nur en sporta senco. Okazis pli modera skikonkurso, gimnastikado kaj marŝado ligitaj al vera vintra turismado. La ekskursceloj estis bone elektitaj — informriĉaj kun neforgeseblaj vidindaĵoj.

La novkonstruita hotelo *Larisa* estis nia tutsemajna “hejmo” — vere hejmeca. La skiejoj troviĝas kvazaŭ antaŭ la pordo. Do niaj skiemuloj volonte profitis tiun konvenan ŝancon. La unuan skikonkursan premion gajnis s-ino Silvia Pura (Rumanio), la duan — s-ro Ben Indestege (Belgio).

Sed en la tradicia karnavala vespero, en kiu estis pli malfacila prijuĝado de vestokonkurso. Ja ne estas enigmo, ke tiusence dominis la loka grupo, kiu posedas respektindan nivelon.

En la kadro de la programo ni vizitis ankaŭ la urban kulturdomon *Reduta* en Braŝovo, kiam en ĝi okazis Esperanto-kurso komenciĝinta antaŭ monato. Mirinde jam kapablis prezenti sin la unuopaj komencantoj, inkluzive de lingvisto kaj verkisto Ioan Topolog.

Martin Stuppig

Du aranĝoj en unu pakajo

Du aranĝoj en unu pakajo — Rusia Esperantista Kongreso kaj festivalo *Esperanto — Lingvo Arta* — okazis 5–9 mar apud la urbo Tiĥvin en Lenin-grada regiono.

Partoprenis sume 64 personoj. Ioma neprecizeco en planoj por unuaj tagoj de la evento kaŭzis tion, ke fakte aktiva laboro (se ne paroli pri vasta programo de “hejmaj koncertoj” en la ĉambro de amikemaj kaj gastamaj urallanoj kaj ne nur tie) komenciĝis 7 mar matene, kaj la malfruintaj gastoj daŭre venadis, dum iuj jam forveturis.

En kelkaj kunsidoj REU-Konferenco akceptis raportojn de REU-Estraro, okazis elektoj de la nova konsisto de la estraro, debatoj kaj cetera organiza laboro.

Por la nova agadperiodo estis elektitaj: Andrej Grigorjevskij (prezidanto), Nikolaj Gudskov (vicprezidanto); la estraron eniris Konstantin Ĥlizov, Aleksandr Osokin, Jurij Karcev, Valentin Seguru, Irina Gonĉarova, Vladimir Bepalov. Krome la Konferenco decidis pri Kontrol-Revizia komisiono (prezidanto Gennadij Basov) kaj pri komisiitoj de REU en diversaj agadkampoj.

Se paroli pri la festivalo EoLA, bedaŭrinde necesas konstati, ke la programo de tiu aranĝo pli kaj pli reduktiĝas. Ĉi foje ne troviĝis sufiĉe da deziroj por okazigi konkurson pri deklamado aŭ “bel-lego”. Tamen ni nepre menciu teamon de Uralo kaj Okcidenta Siberio, kiu serioze prepariĝis al la aranĝo — rezulte ĉiuj povis ĝui gajan prezenton de la teamo kaj eĉ teatran spektaklon. Certe laŭ bona tiĥvina tradicio ankaŭ la organizintoj prezentis sin verse, proze kaj kante. Okazinta ĉe la fino de la renkontiĝo “Totala koncerto” eble estis ne tiom “totala” pro malsano, atakinta plurajn mastrojn kaj partoprenantojn, sed tutegale kortuŝa kaj ĉarma.

Dank’ al zorgoj de tiĥvinaj esperantistoj preskaŭ ĉiuj venintoj estis eĉ persone renkontitaj, nutritaj kaj enloĝigitaj malgraŭ tute malsamaj deziroj, petoj kaj bezonoj. Ĉio cetera — ankaŭ nesufiĉa hejtado en la sporta bazejo, kie la programo okazis — estis eksteriliaj povoj kaj kapabloj.

La sekvan REK oni planas organizi sekvajare en Ĉeboksari (Ĉuvaŝio) aŭ ie apude. Multaj partoprenantoj petis, ke ĝi okazu en pli varma tempo — eble maje.

Aleksandr Osokin

La tria universitato en Litovio

Esperanto estas instruata oficiale ankaŭ en la universitato de Šiauliai kaj Kaŭna humanisma fakultato de la Vilna universitato. Sed en februaro ankaŭ en la pedagogia kaj psikologia fakultato de la Pedagogia universitato en Vilno komenciĝis instruado de Esperanto kiel de libere elektebla studobjekto.

Pli ol 40 studentoj aliĝis al la kurso, kiu daŭros ĝis fino de la printempa studduonjaro. Instruas Gediminas Degėsys — doktoranto de instituto pri kulturo, filozofio kaj arto.

La studado donos al studentoj du kreditunuojn. La 80-hora programo enhavas ne nur rektan instruadon de Esperanto, sed ankaŭ konatigon de studentoj kun problemoj de internacia lingvo ĝenerale, kun eblecoj de Esperanto, kun historio de Esperanto. Ĉiuj studentoj fine de la studado devos verki referaĵon pri la temo.

Povilas Jegorovas

Prezidanto Corsetti en Herzberg

Laŭ invito de la Interkultura Centro Herzberg (ICH), la prezidanto de UEA, d-ro Renato Corsetti, 12–14 mar faris oficialan viziton en Herzberg (Germanio), pasint-jare proklamita de la urbestro “la Esperanto-urbo”.

La urbestro de Herzberg, Gerhard Walter, kunvokis en la urbodomo honore al la vizitanto specialan labor-kunsidon kun akcepto, en kiu partoprenis kaj la lokaj skabenoj kaj la gvidantoj de ICH. En ĝi la urbestro konfirmis la pluan subtenon de la urbo al la internacia agado de ICH, dum la prezidanto de UEA emfazis la varman apogon de la monda asocio de la esperantistaro al la dirita agado kaj anoncis, ke ĝi ricevos oficialan aŭspicion de UEA. Post la kunsido, la urbestro regalas la esperantistan delegacion per tagmanĝo kaj samtage ĉeestis kun diverspartiaj politikistoj alian plurhoran kunvenon en la sidejo de ICH.

La loka gazetaro substrekis, ke la Esperanto-Centro Herzberg jam de kelkaj jaroj akiris grandan reputacion pro siaj sukcesoj rilate al publika apliko de la internacia lingvo en la urbo, ĝemeligita al Góra (Pollando).

Kiel konate, Herzberg tutjare ofertas fak-seminariojn, studsesiojn, pedagogiajn tagojn kaj vintrosemajnojn, krom sennombraj Esperantaj kursoj por lernejanaj kaj plenkreskuloj.

ICH

Sur la foto: Bonvenigo en la urbodoma korto (ICH)

300 koreaj studentoj

En la unua semajno de marto tricent koreaj gestudentoj eklernis Esperanton en tri universitatoj (Korea Fremdlingva Universitato du lernoterenoj, Universitato Dankook du lernoterenoj, Universitato Wonkwang).

La kurso “Internacia lingvo Esperanto” daŭros ĉ. kvar monatojn po du horoj semajne kun du notoj kiel unu el klerigaj lernoobjektoj. Estas notinde, ke la studentoj praktike parolas Esperante kun tutmondaj esperantistoj pere de Skajpo (Skype).

Lee Jung-kee

Mediterranea Esperanto-Staĝo

En la unua MES, okazinta en Agay (Saint Raphael) inter 23 feb kaj 3 marsian lingvonivelon en tri kursoj plibonigis 35 partoprenantoj el sep landoj.

Komencantoj kun Nina Korjnevskaja akiris bazajn konojn de Esperanto. Babilemaj progresantoj diskutis kaj argumentis en konversaciaj rondoj kun Elizabeta Formaggio. Plenposedantoj studis tekston kun Daniel Moirand.

La kursoj okazis ĉefe matene. Posttagmeze oni promenadis en montaro Esterel aŭ laŭ la marborda vojeto de doganistoj. La muzeoj de Frejus kaj Saint-Raphael, la festo de la citronoj en Menton, la karnavalo de Nice — okazoj ne mankis por turismi en tiu bela regiono, ankoraŭ pli bela en tiu periodo dank’ al la mimozoj.

Vespere ni ludis, kantis, dancis, muzikis kaj malkovris rusajn pentristojn. La staĝejo *La Baumette* vere kontentigis la partoprenantojn pro sia marborda situo, manĝaĵoj kaj afabla akceptado.

La unua sukcesplena provo firmigis nian intencon rekomenci venontjare en la samaj loko kaj periodo: fine de februaro — komence de marto 2008.

**Christine Graissaguel
Monique Prezioso**

Kvinpetalo, la komuna punkto

Kiu estas la komuna punkto inter kemiistino, teknikisto en atomcentralo, du librotenistinoj, klubogvidantino, gravuristino kaj liceano?

Pasio al interkomprena lingvo kunigis ilin dum la februaraj ferioj en la internacia kultura esperanto-centro Kvinpetalo en Bures’ (Francio) por lerni Esperanton.

Ani, Jaso, Dinah, Samja, Deniso, ĝojis renkonti esperantistojn el Ruslando. Tatiana kaj Ekaterina venis por praktiki Esperanton, viziti Francion kaj konatiĝi kun homoj. Ni lernis per diversaj metodoj: priskribado de bildoj, prezentado de rolludo, teatra improvizado, elpensado de festa menuo, recenzo de kanzonoj, aŭskultado de radioelsendo, kvizo, ktp... Ni mirigite vizitis la muzeon de Civaux kaj la tombejon plenan je ŝtonaj sarkofagoj. Kaj fine ni ne forgesu la mirindan kuirarton de Johana kaj Marcelo.

**Tatiana, Ekaterina, Ani, Jaso,
Dinah, Samja, Deniso, Mari-elen**

Ne nur bildkartoj

Dum februaro en Kultura Centro de la kvartalo Guinardó de Barcelono estis ekspoziciata kolekto de 150 bildkartoj de Barcelono de 1909, eldonitaj okaze de la kvina Universala Kongreso de Barcelono. Ĉiu bildkarto detale priskribas en Esperanto pri monumentoj, stratoj, placoj ktp.

En la ekspozicio ankaŭ estis afiŝoj pri Katalunaj, Hispanaj kaj Universalaj Kongresoj, kune kun afiŝoj preparitaj por helpi televidan kurson de Esperanto elsendita en 2000 en Baix Llobregat (Barcelono).

La bildkartojn kolektis Ferran Ripoll. Kunlaboris Esperanto-grupo *Aŭroro*, Barcelona Esperanto Centro kaj Kataluna Esperanto Fervojista Asocio.

Martí Guerrero



Vjetnamio prepariĝas al IJK

Ekde 2001, post la Novjaro laŭ la luna kalendaro, Vjetnama Esperanto-Asocio (VEA) ĉiujare organizas renkontiĝon en sia sidejo en Hanojo. Sed la sepa renkontiĝo okazis 18 mar 2007 ne en la sidejo, sed en Hanoja Fremdlingva Universitato — la loko de la venonta Internacia Junulara Kongreso (IJK-63) — kun la slogano “Renkontiĝo inter studentoj de Fremdlingva Universitato kaj vjetnamaj esperantistoj”. Ĝin kunorganizis VEA, junulara Esperanto-asocio VEJO, la universitata Unio de studentoj, la Unio de Junuloj. Ĉirkaŭ 200 homoj, plejparte gejunuloj, partoprenis.

Post kantado de la nacia himno kaj de *La Espero* komenciĝis la kunveno. Vu Xuan Hong, membro de Nacia Asembleo kaj prezidanto de Unio de Amikecaj Organizoj, memorigis la rolon de Esperanto en Vjetnamio dum la milito, kaj nuntempe en la integriĝo de Vjetnamio en la monda komunumo. “Por ni vjetnamoj, Esperanto ludas la rolon de ponto por interkompreniĝo, kaj efika ilo por popola diplomatio”, — diris Hong kaj atentigis, ke la okaziĝo de IJK en Vjetnamio estas granda honoro por la tuta lando, kaj tio ne estas la zorgo nur de vjetnamaj esperantistoj, de junuloj sed de la tuta lando. Li promesas doni al IJK subtenon de la ŝtato.

Nguyen Van Loi, prezidanto de VEA kaj samtempe rektoro de la Fremdlingva Universitato, promesis, ke la Universitato kreas favorajn kondiĉojn por IJK kaj alvokis la studentojn lerni Esperanton. Ankaŭ Van Doan, prezidanto de la Studenta Organizo, kuraĝigis la studentojn lerni Esperanton, kiu estas tre facile lernebla, por bone servi IJK-n. Li konsideras organizon de IJK kiel ĉefan taskon en 2007.

Estas decidita, ke estos malfermita nova kurso de Esperanto por tiuj, kiuj ne ankoraŭ registriĝis, kaj por tiuj, kiuj neregule partoprenas en la nunaj klasoj. Oni planas fondi Esperanto-klubon en la Universitato por organizi regulajn kursojn de Esperanto, paroligi, korespondi, kanti. Kantoj, ludoj kaj loterio varmigas la etoson de la renkontiĝo.

Krom VEA kaj VEJO, funkcias ankaŭ aktivaj Esperanto-Asocioj en Hanojo kaj en Ho Chi Minh-urbo, kiuj okazigas ĉiumonatajn kunvenojn en siaj urboj. La oficiala organo de VEA estas trimonata *Verda Mesaĝo el Vjetnamio*.

Nguyen Xuan Thu



Kino + Esperanto = Festivalo

Okaze de la centjariĝo de Triesta Esperanto-Asocio, estis lanĉita la unua internacia konkurso pri kurtfilmoj *Kurta Kinoesperanto Festivalo*.

La ellaboraĵojn el Italio, Litovio kaj Ukrainio priuĝis jurio de 12 personoj el Triesto kaj el Rijeka (Kroatio). La publika prezento de la verkoj okazis 16 feb, kadre de la Semajno de Internacia Amikeco, dum la gajnintoj estis proklamitaj unu semajnon poste (23 feb.).

La aŭtoroj de la unuaj tri klasifikigitaj kurtfilmoj ricevos premion, en formo de libroj, medalo kaj videofilmoj pri Triesto kaj ties regiono, kaj partopren-diplomon.

1a premio (105 poentoj) al Alberto Grossi (Italio) pro *Emocioj* (daŭro 8'28") — “pro la admirindaj, ravaj bildoj, reliefigitaj de impresema muziko, kaj profesieca uzo de teknikaĵoj. Oni tamen devas aldoni, ke la elparolo ne estis tiom komprenebla, iom tro rapidema kaj mallaŭta, dum prononco ne ĉiam klaris”.

2a premio (93 poentoj) al instruistino Genovaitė Liepinia (Joniškio, Litovio), kiu instigis geknabojn al kino-kreado, pro *Kune en lernejon* (daŭro 11'01") — “pro ties originaleco, imitanta la stilon de malnovaj, silentaj filmoj, pri temo eble iom naiva sed sugestoplena. Ankaŭ la fakto, ke ĝi estis lernejana agado, ludis favoran prijuĝon”.

3a premio (85 poentoj) al Tatjana Auderskaja (Odessa, Ukrainio) pro *Birdoj de Ukrainio* (daŭro 6'40") — “pro interesa prezentado de la loka naturo. Ankaŭ en ĉi tiu kazo, kaj elparolo kaj prononcmankado iom ĝenis”.

Al la gajnintoj tre koran dankon pro la partopreno adresas la organizantoj kaj varman gratulon pro la entute meritoplena laboro.

Oni decidis relanĉi la konkurson, kun espero pri abunda partopreno el diversaj landoj kaj aparte el ekster Eŭropo.

Edvige Ackermann

Denove en la Valo

Ĉirkaŭ sepdek personoj el la ŝtatoj Rio kaj San-Paŭlo 18 mar partoprenis la 67an E-Renkontiĝon de Sudparaiba Valo, en Guaratinguetá (SP).

Post la enkondukaj vortoj de Paulo Sergio Viana, legado de la protokolo de la pasinta renkontiĝo kaj salutvortoj de kelkaj reprezentantoj de lokaj grupoj, Givanildo Ramos Costa kaj Aloísio Sartorato transdonis al la ĉeestantoj informojn pri la okazonta landa kongreso en Rio 8–13 jul kaj respondis al demandoj. Antaŭe, parto de la ĉeestantaro, en alia ĉambro, sekvis fulmrapidan bazan kurson de Esperanto, gviditan de Ademar Diniz. Pluraj homoj deklamis poeziaĵojn el la aperonta *Brazila Esperanta Parnaso*, preparata de Sylla Chaves kaj Neide Barros Rego.

Posttagmeze Mauricio Monken kaj Sylla Chaves prezentis *Gramatikajn Gutojn de Esperanto*. Sekvis prelego de Maria Consileida Conceição Rodrigues pri feminismo en la E-Movado kaj amuza kvizo de José Tenório. Fine Givanildo Costa, Silvia Buhler, Neide Barros Rego kaj José Inácio prezentis brazilajn kantojn en Esperanto.

La 68a renkontiĝo okazos 17 jun en Barra Mansa (RJ).

Aloísio Sartorato

Aŭtomataj tradukiloj

La entrepreno *ABC Enciklopedioj S.L.* kaj la Universitata Instituto pri Aplika Lingvistiko, ligita al la Universitato Pompeu Fabra, en Barcelono, komencis prilabori aŭtomatan tradukilon de la kataluna kaj de la hispana al Esperanto.

Sub la kunordigo de profesoro Nŭria Bel kaj kun la helpo de Kataluna Esperanto-Asocio kaj *Prompsit*, entrepreno de la esplorgrupo *Transducens* de la Universitato de Alakanto, skipo de lingvistoj ellaboros dum dek monatoj programaron per malferma kodo por aŭtomate traduki esperanten el tiuj du lingvoj — oficialaj en Katalunio, kune kun la okcitana.

La ellaborado baziĝos sur la malfermkodaj programoj kreitaj de *Transducens* en kunlaboro kun aliaj universitataj laborgrupoj el Iberio, kaj, pli konkrete, ĝi ekos el la aŭtomata traduk-sistemo per parta sintaksa transfero por parencaj lingvoj nomita *Aperitium*. Oni deziras aparte atenti pri la dokumentado de la metodaro necesa, por ke aliaj laborgrupoj aldonu novajn lingvojn al la sistemo, ĉefe lingvojn malpli uzatajn.

Esperanto jam estis uzita en aliaj projektoj pri aŭtomata tradukado, inter kiuj la plej gravan kreis la nederlanda entrepreno BSO (nun Atos Origin) dum la periodo 1982-1992 kun entute 50 jar-homoj da laborinvesto. En tiu okazo Esperanton oni uzis kiel pontolingvon por traduki inter diversaj oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio. BSO vetis je la uzo de planlingvo kiel Esperanto, kiu per sia reguleco principe simpligas la tradukprocezon kaj provizas pli altan fideindecon. Tamen tiu projekto finfine ne prosperis, same kiel ĉiuj aliaj tiutempaj konkurantoj, pro la nepreteco de la teknologio.

Katalunio akumulis en la lasta jardeko multajn sciojn pri aŭtomata tradukado. Pluraj ĵurnaloj havas siajn ĉiutagajn eldonojn en la kataluna kaj la hispana lingvoj danke al aŭtomataj tradukoj (nepre kontrolataj de reviziantoj).

Pinte de tiuj fakaj scioj pri aŭtomata tradukado situas la Universitato de Alakanto, en Valencilando, dum la Universitato Pompeu Fabra, la laste kreita publika universitato en Katalunio, per sia Universitata Instituto pri Aplikita Lingvistiko, elstaras de kelkaj jaroj per siaj esploroj pri komputa lingvistiko.

KEA



Margarita ŝelve, prezidanto de LatEA kaj nia peranto

Latvio kun nova prezidanto

24 feb 2007 en Rigo okazis la 8a Konferenco de Latvia Esperanto-Asocio (LatEA) kun ties Ĝenerala Kunveno. Pri la asocia agado dum 2004–2007 raportis prezidanto de LatEA, Aldis Buŝs, kaj la estraro. Jen kelkaj faktoj:

La asocio ricevis novan statuton kaj aliĝis al EEU. La ĉefa aranĝo en tiu periodo estis BET-41 en Rigo kun 150 partoprenantoj el 20 landoj. Ĝi vekis intereson de amaskomunikiloj.

Omaĝe al la 140-a datreveno de latva poeto Jānis Rainis en 2005 estis eldonita lia poemaro *Antaŭen*.

En Latvia Universitato en 2006 estis registrita kiel liberelektita kurso “Enkonduko en praktikan interlingvistikon, Esperanto”, kiun kompilis Aivars Kalniņš, Andrejs Bankavs kaj Leons Taivans. Kvankam la intereso de studentoj estis ne tro granda, la fakto, ke oni povas oficiale lerni Esperanton en la plej granda altlernejo de Latvio, estas grava atingo.

La Ĝenerala kunveno elektis novan estraron de la asocio: Margarita ŝelve (prezidantino), Bīruta Rozenfelde (vicprezidantino), Aina Januŝevska (kassistino), Māra Timermane, Aldis Buŝs, Jānis Kalniņš, Aristīds Mediņš (estraranoj). Bīruta Rozenfelde estis elektita Honora Membro de LatEA.

La plej gravaj nunaj taskoj de latvaj esperantistoj estas:

— organizi retpaĝon de LatEA, ĉar la banala eldiro “se vi ne estas en reto, vi ne ekzistas” estas vero;

— organizi Esperanto-kursojn, reklami la eblecon lerni Esperanton al studentoj de Latvia Universitato;

— reeldoni la “latvan ŝlosilon”;

— organizi BET-44 venontjare.

Margarita Ŝelve

Unufraze

★ Prezidento de Finnlando, Tarja Halonen, akceptis protektantecon de la programo de la Jubilea Jaro de la E-Asocio de Finnlando, fondita en 1907. (*Esperanta Finnlando*)

★ Aŭstria Ministerio por Ekonomio k Laboro uzas Eon en sia retejo *Pri Laborinspektejo*. (Leopold Patek)

★ Retejo *Scintilena*, la dua plej vizitata speleologia retejo en la mondo, por plivastigi sian legantaron decidis aperigi artikolojn en diversaj lingvoj, inter kiuj ankaŭ Eo danke al kunlaboro kun la loka E-grupo *Paclingvo*. (*Informitale*)

★ Stokholma restoracio *Esperanto* ricevis stelon en la prestiĝa restoracia gvidlibro Michelin k iĝis la naŭa restoracio en Svedio tiel distingita; la restoracio estis taksita kiel la tria plej bona en la lando. (*Libera Folio*)

★ Irana sociologo Ehsan Naragi, kies influo en scienco k politiko de Irano estas forte rimarkinda, vizitis la oficejon de Irana E-Asocio k esprimis sian kontenton pri la aktivado de e-istoj en Irano k anoncis sian apogon al Eo. (Reza Torabi)

★ Korea e-isto Jang Jeong-Ryeol el Pusano publikigis en la Pusana Taggazeto 24 feb 2007 duonpaĝan intervjuon kun Spomenka Ŝtimec; la gazeto aperigos en sia retejo la libron de Ŝtimec *Kroata milita noktlibto*, kiun Jang Jeong-Ryeol tradukis el Eo al la korea. (S.Ŝ)

★ 22 feb 2007 usona ukrainlingva gazeto “Ĉas i podiji” (Tempo kaj eventoj), eldonata en Ĉikago, kie loĝas 300 mil ukrainioj, publikigis artikolon de Renato Corsetti pri la Gepatralingva Tago en la traduko de Viktor Pajuk. (Araneo)

★ Pollanda ILEI-sekcio ekhavis sidejon en la centro de Krakovo, ĉe la Matejko-Placo, apud la Akademio de Belartoj, vidalvide al la Barbakano k la Floriana Pordego. (Maria Majerczak)

★ 15 E-instruistoj el Benino, Eburabordo, Niĝerio, Niĝerlando k Togolando 18-24 feb partoprenis ILEI-seminaron en Portonovo (Benino), kiun gvidis Zsuzsanna Kóródy el ICH Herzberg. (Landa Agado)

★ La membraro de SAT-Amikaro, asocio de laboristaj e-istoj por franclingvaj landoj, kreskis de 705 membroj en 2005 al 723 membroj en 2006. (*La Sago*)

★ La estraro de E-Ligo por Norda Ameriko (ELNA) decidis, ke Vilĉjo Harris servu kiel direktoro ekde 15 feb 2007; Don Harlow, la antaŭa direktoro, bedaŭrinde ne plu povas servi pro malsaneco. (Filipo Dorcas)



Leonard Orban: Nova respondeculo pri lingvoj en Eŭropo

(Vide el Bruselo) Laŭ la nova respondeculo de la Eŭropa Komisiono (EK) pri multlingvismo, rumano Leonard Orban, Eŭropo ne atingos siajn celojn rilate al la ekonomio kaj renovigo sen plene agnoski la valoron de multlingvismo. Orban, kiu dum la unuaj monatoj de sia nova vivo en Bruselo devis multe peni por konvinki, ke li faros ion “gravan”, parolis dum la Eŭropa Komerco Pinto-kunveno (EBS) en marto.

“La esploro montras ke la multlingvisma ero de entreprenado ne povas esti subtaksita. Multaj entreprenoj celas translandliman komercon kaj multe pli devas tiel pensi. Esploro montras rilaton inter eksportoj kaj produktiveco. Sed esploro pri kial firmaoj ne aktivis sur fremdaj merkatoj ankaŭ distingas malbonajn lingvajjn konojn kiel bariero al kresko”, — diris Orban.

Orban profitis de la invito al EBS, iaspeca provo kopii la formaton de la altetaksata svisa komercrendevuo Davos, por longe paroli pri la graveco de lingvoj. Efektive Orban ankaŭ estas praviganta sian grandiozan salajron — tridekoble pli altan ol la averaĝa salajro antaŭ impostoj en Rumanio.

Tamen Orban pravas. Laŭ freŝa studo de EK pri preskaŭ 2000 eksportantaj firmaoj, 11% de la intervjuitoj diris, ke ili perdis kontrakton pro la manko de lingvaj konoj. Laŭ la studo, la averaĝa kosto po firmao estis 325 mil eŭroj dum trijara periodo. “Estas signifa ebleco por malgrandaj firmaoj kreskigi eksportojn, se ili investus pli en lingvoj kaj evoluigus lingvan strategion”.

La studo de la Komisiono ankaŭ montris ke kvankam la angla dominas, kiel “komuna lingvo” por internacia komerco, ankaŭ aliaj lingvoj gravas. Ĉirkaŭ kvarono de la intervjuitoj sentis bezonon je plibonigo de lingvaj konoj en la germana, franca, hispana aŭ rusa. Aliaj bezonas neeŭropajn lingvojn — la ĉinan, araban kaj urduan.

“Malgrandaj firmaoj, ne mem investante en lingvan trejnadon, preferas ke edukad- kaj trejnadsistemoj donu al homoj bonajn lingvajjn konojn. Aŭ ili dungas homojn kun la necesaj lingvoj, — diris Orban. — Tamen la raporto montras, ke ĉi tiu aliro ne solvos la problemon”. Pro tio Orban volas instigi al “vigla” debato — por granda konferenco. “Ni devas sekurigi, ke niaj edukad-sistemoj donu al junaj homoj la lingvajjn konojn kiuj ebligis ilin plene profiti de Eŭropaj eblecoj en komerco kaj dungigo”, — diris Orban. La Komisiono argumentas ke jam nun pli ol duono da eŭropanoj “parolas” alian lingvon.

Dafydd ab Iago

Instruado de Esperanto per Esperanto

Mia neesperanta amiko, kiu ofte foliumas miajn numerojn de LODE, ĉiam demandas min kial en la revuo mankas anguleto kun leciono de Esperanto. Li diras, ke li *provus* lerni ĉi tiun ekzotikan (“ekzotikan” por li) lingvon. Li ne komprenas, kial tiel bela kaj alloga revuo ne propagandas Esperanton sur siaj paĝoj. Li asertas, ke belaj eksteraj paĝoj altiras al revuo kaj vekas deziron trarigardi kaj eĉ iomete legi... Li ankaŭ ne volas kompreni, ke eĉ ne ekzistas sukcesaj provoj de instruado de nia lingvo en Esperanto-revuo.

Mi scias, ke Ĉe-metodo sukcesis kaj sukcesas instrui Esperanton, sed nur buŝe (voĉe). Mi suspektas, ke por revua instruado oni devus havi bonan koncepton (metodikon) kaj — eble — ankaŭ multe da precizaj desegnaĵoj, per kiuj oni povus klarigi multajn aĵojn, agojn, kolorojn ktp. Se Vi opinias, ke ekzistas bezono verki la lecionojn, ĉu Vi havus sugestojn kaj ideojn rilate al ĉi projekto? Aŭ eble Vi mem preparu proponon de la unuaj lecionoj de nia lingvo. Mi opinias, ke ĉefredaktoro de LODE devas havi minimume 6–8 unuajn lecionojn por kviete komenci presi ilin. La plej bona loko por ĉi tiu eduka projekto estas la antaŭlasta paĝo de LODE.

Sugestojn kaj provojn pri ĉi ideo sendu al mia ret-poŝto: avolamer@ols.vectranet.pl.

Marian Zdankowski

Nova eldonprojekto *El ombro*

Ni volas legi interesajn rakontojn. Ni volas, ke en Ruslando estu pli da aŭtoroj — jam spertaj kaj ankoraŭ novaj kaj junaj. Por tio ni bezonas novajn librojn. Do, aŭtoro + rakonto = libro!

Kio estas *El ombro*? Estas libro — kolekto de originalaj rakontoj en Esperanto de rusiaj aŭtoroj. Estas libro, kiu nepre volas trovi sian publikon. Ĝi ekzistas ne por aŭtoroj, sed por legantoj!

Kiuj estas invitataj partopreni? Ĉiuj ruslandaj verkemuloj! Se vi jam estas aŭtoro — sendu al ni vian novan rakonton! Se vi estas poeto aŭ tradukisto — provu verki prozon, ni certas, ke vi sukcesos! Se vi neniam verkis, sed volas — tio estas via ŝanco anonci vin talenta verkisto!

Kio estu via rakonto, kiun vi sendos? Temo de via rakonto estas libera. Amplekso de via rakonto estu ne pli ol 12 tajpitaj paĝoj. Se via rakonto estas pli ampleksa — ĉiuokaze sendu ĝin kaj la redaktoroj respondos al vi. Via rakonto devas esti nova (aŭ, minimume, neniam publikigita ie ajn). Se vi havas pli da rakontoj — sendu du aŭ tri! Sendu vian rakonton antaŭ 1 sep 2007.

Redakta komisiono taksos ĉiun rakonton individue kaj neformale. Lingve korektos kaj stile redaktos la rakontojn. Gravajn ŝanĝojn en rakonto nepre traktos kun ties aŭtoro. Aparte decidis pri loĝantoj de aliaj ŝtatoj, kiuj deziras partopreni.

Kiu prizorgas la libron? Iniciata grupo kaj Rusia Esperantista Unio, kiu garantias ĉiuf flankan reklamadon kaj disvastigadon de la libro tutmonde en Esperanto-libroservoj kaj kongresoj.

Kontaktoj de la redaktoroj: Nikolaj Gudskov nikolaj@yandex.ru, Grigorij Arosev arosev@gmail.com. Sendu vian mesaĝon samtempe al la du adresoj!

Poŝta adreso: 105318, Москва, а/я 57, Н.Л.Гудсков.

Eksenti la lingvon

Parolante pri PMEG oni preferas atenti ties esperantologian valoron. Sed por mi PMEG estas eĉ valorega, ĉar ĝi ebligas pli bone orientiĝi ne sole en Esperanto.

Mi ne estas kapabla ekposedi la lernatan finnan lingvon sen orientiĝi en ĝi kaj sen senti ĝin. Do mi lernas la lingvon pere de konstruita far mi surbaze de Esperanto aparta gramatika sistemo, kiu iugrade similas al tiu de PMEG. Kaj nome pro tio mi, ricevinte la libron, tuj komprenis ties utilecon. Kaj nun mi ne studas PMEG, sed simple tradukas paĝon post paĝo en la finnan lingvon. Tiamaniere mi povas eksenti diversajn nuancojn de la lernata lingvo. Tamen ĉe mi estas revo dumtempe integriĝi resumon de la granda analitika laboro de Bertilo Wennergren kun propraj ideoj. Estus bone, se sendube tre okupita sinjoro Bertilo Wennergren trovus iom da tempo kritike kontroli la laboron.

Vilorg Teräväinen

Indulgesperaj referencoj

Kiam denove mi observas certan maltoleron demonstratan de certaj partizanoj de universala toleremo en la vido de iu reguliga minaco, mi redankas la poeton King Krimson, kiu eligis la veran sloganon de sindefendo (“Confusion will be my epitaph”). Homo de malnova generacio, li ankoraŭ sentis bezonon del memidenteco. En la samaj jaroj filozofoj de la sama generacio sonigis la kontraŭan ideon pri minaca analogio inter scienca kaj socia ordigo obeiga. Mi referencu plej freŝan reciton pri «potenculoj kiuj megalomanie kaj diktatore intervenas en la vivo de “ordinaraj homoj” kiuj ne emas konformi al iu specifa opinio» (LOdE-149). Tiu ekscentra penso pri simileco inter heroldoj de striktaj leĝoj naturaj kaj zelotoj de diktatoraj reĝimoj psikologie reflektas la rilakson de moderna konsumanto kun lia aŭtenta paniko antaŭ kiu ajn streĉo mensa ĉu korpa. “Preskaŭ ĉio estas relativa en la fizika mondo”, — tiel eksplikas mia jam sistema oponento Espondo la vantecon de mensa klopodo. Tute prave: konfuzo ne konvenas kiel epitafo al individuoj kun fluktua intelekto en flua maro de misrealaĵoj.

Sed kara sinjoro (sinjorino) Espondo! (Pri *sinjorino* mi pardonpetas, se mi tro tarde divenis, duoble pardonpetas, se mi divenis mis.) Do, kara sinjor(in)o Espondo! Kiam vi akuzas min pri mia “ege slav-influata lingvaĵo” vi ja devas agnoski la ekziston almenaŭ de iuj modeloj, malgraŭ la ĝenerala “relativeco” kiu, laŭ vi, regas la mondon. Ĝenerale, iuj trovas min tro romanid-influata, pri kio mi konsentas kun tiu aldono, ke mia lingvaĵo estas simple iom tro analiza, kaj inter la slavaj ja ankaŭ ekzistas analizaj lingvoj (ekz-e, la bulgara). Eble mia koleg(in)o estas forte specialigita en la bulgara, sed ĉu ne estos tro kuraĝe se mi supozus ke li/ŝi volas simple iom raspi la oponenton — ne rasiste, tute ne! — sed ĉiuj ja vidas kiaj estas tiuj slavoj: serboj, poloj, rusoj...

Koncerne la kritikon ĉirkaŭ PMEG mi reklarigu indulgespere, ke mi solidariĝis kun s-ro Couturat kiu, kvankam ne skandinavo, ne apartenas tamen al la slava gento. Mi konfesu ankaŭ, ke iom (sed tute ne plene) mi solidariĝas kun P. Sinfield, kiu diris iom tro moroze:

The fate of all mankind I see

Is in the hands of fools.

(King Krimson. *Epitaph*)

Alen Kris

LOdE. La redakcio fermas la diskuton. Dankon al ĉiuj reagintoj al la recenzo de PMEG!

Ĉu forgeso aŭ prisilento?

En LOdE-148 mi rimarkis, ke la recenzo de Joxemari Sarasua pri la versromanio de Puŝkin *Eŭgeno Onegin*, verse elrusigita de Valentin Melnikov, tute ne aludas la tradukon de Nikolaj Vladimiroviĉ Nekrasov, same versan kaj eldonitan en 1931 de SAT, kredeble en Moskvo. Tamen, ŝajnas al mi, ke tiu malnova traduko ne estis malbona kaj daŭre estas atentinda. Ĉu temas pri forgeso aŭ decidita silento?

Jacques Roux

Gajnu ferion en la koro de Germanio

Gajnu en konkurso de *Juna Amiko* lokon en la dua Somera Arbara Lernejo (SALO 2) — feria renkontiĝo por infanoj kiuj parolas Esperanton. La aranĝo estas organizita apud la Esperanto-urbo Herzberg.

SALO 2 daŭros du semajnojn: de 28 jul ĝis 11 aŭg. En la programo okazos ekskursoj, naĝado, konkursoj, ludoj, sportoj kaj multe pli.

Aĝlimoj 11-17. La premio inkluzivas tranoktadon, programon kaj tri manĝojn tage. Ne inkluzivitaj estas vojaĝ-kostoj kaj asekuro — kiun oni nepre akiru.

Esperanto-Centro Herzberg donacas du premiojn: la unua: 6-taga senkotiza junula partopreno en SALO 2; la dua: 3-taga senkotiza junula partopreno en SALO 2.

1. Sendu la kaŝfrazon de la kruc-enigmo en *Juna Amiko* 2007, №1, paĝo 26.

2. Sendu viajn respondojn al la kvin demandoj sur paĝo 5 de *Juna Amiko*, 2007, №1.

3. Sendu verkon kun 400 ĝis 600 vortoj pri unu el la temoj: (1) Kial mi volas partopreni en SALO 2; (2) Ŝanĝoj en mia vivo; (3) Maŝinoj — ĉu niaj amikoj aŭ malamikoj?

Juna Amiko rezervas la rajton aperigi konkursaĵojn. Ĉiu konkursaĵo kiu atingos akcepteblan nivelon eniros loterion.

Sendu vian respondon rete al: stefan.macgill@gmail.com, kun temlinio “SALO2 Konkurso” aŭ paperpoŝte (pf. 193, HU-1368 Budapest, Hungario). Limdato: 10 jun 2007. Ni tuj sciigos la gajnintojn per ret-poŝto aŭ letero. La rezultoj aperos ĉe la retejo de *Juna Amiko* en la biblioteko ĉe www.lernu.net ekde 15 jun.

UEA: Konkurso pri jubilea simbolo

En 2008 Universala Esperanto-Asocio estos 100-jara. Por ekhavi grafikan identigilon, kiu kunligu ĉiaspecajn aktivaĵojn tra la mondo okaze de tiu festo, la Estraro de UEA lanĉis konkurson pri jubilea simbolo.

La simbolo emfazu la 100-jaran historion de UEA kaj la daŭran aktualecon de ĝiaj celoj kaj idealoj. Ĝi estu elvoka, laŭeble simpla kaj uzebla presite kaj elektronike. Ĝi estu unukolora aŭ plurkolora sed ankaŭ unukolore uzebla. La simbolo estos uzata nur lige kun la festado de la 100-jariĝo de UEA kaj ĝi ne anstataŭos la ĝeneralajn movadajn simbolojn (verda stelo, simbolo de la Jubilea Jaro 1987 k.a.).

En la konkurso rajtas partopreni ĉiuj, ankaŭ ne-esperantistoj. Oni rajtas partopreni per pli ol unu konkursaĵo. La gajninto ricevos premion de 500 eŭroj. La rajtoj pri la premiita konkursaĵo, inkluzive de ĝia eventuala adapto, apartenos al UEA. Pri la aljuĝo decidus la Estraro de UEA.

Oni sendu la konkursaĵojn ĝis 30 jun 2007 al UEA (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) aŭ rete al simbolo@co.uea.org.

GK UEA

Dum malviglas la hejmar'

DasGupta, Manashi. *Dormanta Hejmaro* / Tradukis el la bengala Probal Daŝgupto. — Antverpeno: FEL, 2006. — 239 pĝ. — (Serio *Stafeto*, №29).


Oni prave konsilas antaŭparole legi tiun libron por ŝanĝi iom la etoson de la rutina vivo. Prave por okcident-eŭropano, kvankam ankaŭ li ofte povas nun, sen tro migradi, trovi vesper-nokte kvartal-angulon kun tre specifa atmosfero de minaco. Tiun specifon la libro ne akcentas. Estas fono de la ekzisto, ne pli; sed tio esprimas aŭtentecan pli bone ol dinamikaj scenoj de perforto. Ni transportiĝas do al relativa periferio enspaca kaj iom vojaĝas pasintecan por nin retrovi en Orienta Barato (Hindio) komence de la 1970aj jaroj. Post dudeko aŭ trideko da paĝoj nia feria turista percepto transformiĝas en atentan rekonon: en iel nova aspekto ni revidas la saman — eble eternan — aktualon.

— Oni ne plu devus loĝi en tiu ĉi urbaĉo... Ĉu oni povas loĝi ĉi tie kaj resti sana? — replikas iu konato pri Moniŝankor, la mense malsana patro de dekkvarjara Ŝontu.

Guste ĉirkaŭ Ŝontu pasas zigzage la tuta rakonto. Liaj bonvolaj vartantoj interamikaj estas bonaj homoj, simpatiaj kaj simpatiantaj, bonaj civitanoj, kiuj — ĉiuj siamaniere — kontraŭstaras la “malsanan socion”. La manieroj plejdiversas: de kultivado de sia vilaĝa ĝardeneto ĝis preparado de la “forta, kruela, potenca, ĉioampleksa revolucio”. Sed estas io kontempleca en la stilo de ilia vivo, iu troa spirito del eterno, pasivismo foje fatalista. Oni disputas, diskutas, debatas kaj kartludas. Oni ankaŭ utile laboras, ĉar oni ne estas marĝenista aŭ eskapeca. Oni reagas do... Iel nevideble la knabo sin translokas al la rando de la reaga spektro, ĝis iĝi gerilano. Lia skizofrenia patro fokusas por li la esencon de tiu dormanta hejmaro: “Mi maĉu, sidaĉu, malplaĉu”. Estas sufiĉe sentebila inklinno por adoleska idealisto, se li konscias la neceson de reago kaj se la aĝuloj certas ke “La voĉdonado de la senkapabluloj... tia demokratio estas ridinda falsajo”.

Tiuetose — jen konfuze, jen haose — skizofreniulo sin prezentas kiel legitima profeto de la dementa socio.

— Sed vere ĉio estas nevalida. Ĉio nula. Ili forigos. Eliminuos ĉiujn, — deliras Moniŝankor. — Burgaĝaj kutimoj



kaj aventurista programo kombiniĝas al terura forelspezo de junula potenco! ... oni devas bati, oni devas mortigi, jen la sola vojo.

Tiu profetaĵo tuj forigas la tempodistancon de trionjarcento kaj neniigas la menciitan marĝenecon de la loko. Ribeloj junularaj, en Parizo, Kopenhago... ja celas sekvi la formulon. Adoleska Ŝontu aliris la saman padon en bengala ĝangalo, natura kaj civiliza. Necesas kelka naiveco de infano por pridubi tiun drastan elekton:

— Se ĉio forbrulos, paĉjo, kio do fariĝos nova? — demandas (senresponde) la malgranda frato de Ŝontu.

Pri politiko do saĝe temas en tiu ĉi romano, sed ne tro insiste. En tiu mezuro, en kiu la politiko koncernas la tuton de la vivo. Temas ankaŭ pri amikeco kaj amo, pri respondeco kaj valoroj de la vivo.

Prozo neartifika, sed tre plastika. La originalo de Manashi Dasgupta (kiu verkis en la bengala) forte reliefas el la traduko. Ĝia lanta ritmo iel hipnotizas kaj resonigas (ekzemple, ĉi-tekste). Sed ĝi neniel bremsas la penson, kontraŭe — kreas fluan humoron favoran por ekvilibra medito. La romano “mense riĉigos vin”, — asertas antaŭparole Claude Piron. Sendube tiel.

Alen Kris



Ĉu knedi aŭ ne knedi...

Corsetti, Renato. *Knedu min Sinjorino! tabuaj kaj insultaj esprimoj en Esperanto!* — 2a eldono, kompletigita kaj reviziita. — Thaumiers: La KancerKliniko, 2006. — 36 pĝ.

Knedu min Sinjorino! de Renato Corsetti k.a. (ne miksu kun la romano *Kredu min, sinjorino!* de Cezaro Rossetti — pluraj precedencoj jam estis!) reaperis kiel dua, kompletigita kaj reviziita, eldono. Subtitole la broŝuro estas deklarita “tabuaj kaj insultaj esprimoj en Esperanto!” (tiel, kun kri-signo). Ni vidu, kiomgrade tio veras.

La libreto konsistas el 9 ĉefaj partoj: Insultoj, Sakroj, Evit-esprimoj, Interjekcioj, Onomatopeoj, Tabuaj vortoj, Metaforoj, Slangaĵoj, Ekzemploj de kunmetitaj esprimoj.

Ĉiu parto estas alfabeto ordigita listo de koncernaj vortoj kaj/aŭ esprimoj, kun mallongaj difinoj. La aŭtoroj evidente strebis enlistigi ĉion iel rilatan al rubriktitoloj. Inter “insultoj” troviĝas, ekzemple, “ĝenulo — kontraŭ homo pro ĝeneco”, ankaŭ *afekta, avara, babilema, ebria* k.m.a., kun same taŭtologiaj klarigoj. Apenaŭ tiuj vortoj nomeblas insultoj, kaj apude staras tute neŭtralaj *malordo, obtuza, rubo, svatisto, triviala, tumulto...* Ĉu la aŭtoro(j) kredas, ke leganto nepre estas idioto aŭ eterna komencanto (ĉi-lasta “insulta” esprimo en la vortaro ial mankas)?..

De kelkaj radikoj aperas po 4–5 derivaĵoj kun praktike identa signifo: *abomena, abomeni, abomeninda, abomenindaĵo, abomenindulo* estas apartaj artikoloj, evidente nur por plenigi paĝojn — ke la libreto iom dikiĝu kaj do aspektu pli impone.

La listoj de 81 interjekcioj kaj 69 onomatopeoj estas interesaj, supozeble la plej plenaj, sed apenaŭ utilaj praktike: la aŭtoro mem en la enkonduko agnoskas, ke Esperanto restas plejparte skriba lingvo, kaj eĉ la plej efektivaj parolantoj uzas interjekciojn el sia gepatra lingvo ankaŭ en Esperanto. Mi aldonu, ke ambaŭ tiujn vortspecojn oni ĝenerale uzas malofte (kaj nur en emocia stato, kiam oni kutime forgesas pri vortaraj normoj — se vi, enbatante najlon, hazarde trafos martele vian fingron, vi probable krios ion alian ol rekomendas ĉi vortaro), kaj ke ankaŭ tiuj listoj estas arte pufigitaj: ĉu *denuve!*, *haltu!* aŭ *helpu!* vere estas interjekcioj?

Da “tabuaj” vortoj en Esperanto reale ekzistas apenaŭ deko (kaj eĉ tiuj ne estas vere tabuaj, alikaze ni ne ekscius ilin, havante nur skribajn fontojn), tamen la koncerna rubriko estas multe pli ampleksa, enhavanta ankaŭ sciencajn terminojn kaj ordinarajn vortojn el “fik-feka” sfero: *erotiko, gejšo, palpi, sekso...* Do ankaŭ ĉi tie ni vidas strebon de la aŭtoroj ĉiel pliampleksigi la libreton — sed malgraŭ ĉiaj artifikoj ĝi estas nur 36-paĝa.

La plej interesaj kaj valoraj estas la lastaj rubrikaj. Inter “metaforoj” troveblas, i.a., 71 sinonimoj por *peniso* kaj 12 por *vagino* (feministinoj, alarmu pro neegaleco!). Uzo de “slangaĵoj” povos fari vian parolon bunta kaj sukplena, la listo helpas trovi vortojn kaj pri ĝeneralaj — *malrestoracio, neprejo* (necesejo), kaj pri specife Esperantaj aferoj — *kabei, kosperanto, strangla, talpo*, kaj certe delonge fama *krokodili*. Cetere, la titola vorto *knedi* troveblas en neniu el la listoj, do leganto mem fantaziu, kion devus fari la celata sinjorino al sinjoro Corsetti...

Al ĝena persono vi povos proponi: “Iru nombri viajn testikojn!” aŭ “Dis-saltu kiel la obstinaj baroj de miljaroj!” Kaj kiam iu vican fojon demandos, ĉu en Esperanto ekzistas maldecaj sakroj, vi povos, improvizante laŭ “ekzemploj de kunmetitaj esprimoj”, prezenti eĉ “multetaĝajn” frazojn, ne malpli fortajn ol famaj rusaj...

La nova eldono pli oportunas ol la unua: formato A5 anstataŭ A4, pli firma kovrilo. Komposteraroj ŝajne mankas. Do, bonan sakradon! Je sankta Ludoviko!

Valentin Melnikov

Majstra prezento de Alen Kris

Kun intereso mi legis la recenzon de Alen Kris pri la tri, tradukitaj de mi, verkoj de Platono (LOdE-149).

Mi deziras gratuli la recenzinton, kiu, okupinte sin pri la esenco de la afero, pri la senmortaj Platonaj verkoj mem, prezentis ilin vere majstre. Mi diras tion, ĉar ordinaro la recenzistoj de nia Esperanto-gazetaro lasas flanken la verkon mem kaj sin okupas pri kritikado de la tradukado, serĉante pri mankoj, deflankiĝoj, eraroj k.a.

Mi tute ne timas la kritikon, tamen, ĉar mi opinias ke tia praktiko maljuste nocas la tiom valorajn klasikajn verkojn pri kiuj mi interesiĝas, mi evitas oferi miajn tradukojn por recenzado.

Spiros Sarafian

Anĝelo nekonkreta

Povorin, Mikaelo. *Verula sezono; Revula sezono: 2 K-Diskoj* — Moskvo: s. e., [2006].

Ja sufiĉe multaj homoj firme kredas, ke l’ aŭtoro del’ sube recenzataj “Sezonoj” mokturmentas l’ aŭskultantaron. La bando *Piĉismo* ritme kaj onanisme knedas, ke vodko kaj mariĥuano antaŭ la koncerto enkadre del’ Universala Kongreso en Vilno multe pli e-fikas por punk-roka haleluja, ol provludoj.

Ĝuste tiam renkontiĝis du koloroj: Verda Bardo kun Blua Birdo kaj Barba Bleko en blanka T-ĉemizo kun Vinni La Puo eksuĉe la Nigrajn Kolbasojn.

Do, operacie mobilizinte por l’akompano la plej cinikajn kanajlojn de Litovio — la porno/sang-grinculojn *Disfordija* el provinca Jonavo — certe prognozeblis, ke por la civilizsolidaj gesinjoroj kun verdstelaj surpuge nia degenera bruaĉo ŝajnos nekomprenebla kaj malestetika, sed la panikpublika amasfuĝo komenciĝis tuj ekde mia premiera sovaĝraŭko: “A-nark-iiiiioo En UUUUUUU-KOOOOOOO!!!” kaj post nur kelkaj minutoj el l’ plen-plena halo restis apenaŭ du dekoj da feliĉe skuiĝantaj kripluloj, almenaŭ duono el kiuj estis niaj geamikoj el l’ loka subgrunda sceno, por spekti mian infersatanadon, masturbante l’ violentan violonon, ĉiuminute montrante terurajn muzelojn al Slavka por li ne plu polku aŭ drumu ĝin dekoble pli rapide, sed de kie mi konu pri l’akademia vangarda komploto kun Arma, seriozmiene vanpenanta manpremi samtempe maksimuman klavarkvanton del’ arkaika sintezilo *Venta* kun periodaj ebriprovvoj kunbleki en la silentan mikrofonon, dum Iggy monstribasis, temp-al-tempo ventrgruntante esperantaj blasfemojn, surfone del’ disharmonie dishakita duonhora puzlo el *La Espero* del’ Ensemblo de Kanto kaj Danco de Varsovia Politekniko.

Jam forirante kun gitaroj al l’aŭto, min kaptis unu el raraj survivintaj ĝisfine esperantistoj kun infaneska ĉielrigardo. Donacinte la vulgarrozan kesteton li modeste permesis idiotremiksi.

Reveninte post la kongreso hejmen, profunde alkohola pro tagnokta kompanio del’ ĉefredaktoro de LOdE, mi scivole esploris la minimalistan kovrilon *Dancmuziko de Miĥail Povorin* kun la ĉarma aŭtografoto:

*Diboĉa bubaĉ’,
Mia samidean’,
Ni faras aferon komunan!*

“Aha!” — komprene konkludis mi, ŝovis la kreaĵon del’ novakirita spiritfrato en komputilon kaj ekridspasmis ĝishike, ja *Asorti* ne plu plej stultas en Esperantujo. Imagu E-folkloran *Zim-babve* (para-ram), diligente komponitan kiel *Rasputin* de *Boney M* per antaŭinunda trakilo; 5 el 13 ĉipaj elektronikaĵoj instrumentas, taŭge kaj por infangardena matenfesto, kaj por sintezĝojo de psikedeldiskoteko, kaj por ukrainsteba vilaĝklubejo.

En la du sekvaj jam profesie registritaj kaj kopiitaj KDR-oj (kial ne fari normalajn kompaktdiskojn?? Temas ne pri prestiĝo... Ĉiurlionis-on oni demandis: “kial vi paŝtelas, ja post kelkaj jaroj detruigis?!”), sed li per palperboj klak-klak ege amuzas, kiel varie sonas la samaj kantoj en asketa gitara aranĝo.

Eks-sovetia Esperanto-barda tradicio ne havas oran mezon: aŭ la nubdioj Soroka kaj Amzejev, aŭ centoj da banaltendaraj lignofajrukuleluloj, interesaj nur por kulturologiaj monografioj pri primitivaj kanzonformoj kaj junaj krokodilinoj revantaj edziniĝi aŭ almenaŭ perdi himenon en malseka tendo. Totala perfektismo kaj detalamo de Povorin strebis kilotunojn da mentala energio (fakte la tutan movadan vivon) al fingrumo de 40 komplikaj melodioj kaj lekredaktado de senriproĉaj versoj okulfrape pli nivelaj ol poezio de Igorj Beljakovskij, Georgo Deŝkin, Klara Ilutoviĉ, Grigorij Arosev, Nina Cvileneva k.a. feliĉuloj dekoritaj far lia akvarela tenoro (sed la pseŭdorimon “vendej’-trezorej” en propra *Florvendistino* li tamen ne rimarkis), do anigis al kategorio de genioj kaj Nataŝa Gerlaĥ legitimis la panteonan novicon per la sirena komplezo.

Konfuzas nur impeto krei la muzikon por *Du Koloroj* de Dmitro Pavliĉko, dum popularegas la klasiĉaĵo de O Aleksandr Bilaŝ, sed ankaŭ helpas deĉifri la metamorfozon del’ Arlekeno al la vojo de blanka klaŭno, sed oftaj laŭstatutaj bastonbatoj nigriĝis la animon kaj malica rideto kaŝatas sub teneraj strofoj de Ikarĉjo.

Fine necesas klarigi la bazan demandon: kiu do primokas?! Tiuj bluaj okuloj de infano ne povas mensogi...

Glebo Malcev

Punko kaj anarkio pludivas!



Hodiaŭ ni parolos pri muzikstiloj ekstremaj kaj bruegaj... Vi jam havas kutimon pri tiaj muzikstiloj kun nia amiko Glebo de *Piĉismo*, sed ĉi tie temas pri pli ekzotika destino... ni iras al Japanio ĉe la Aktiva // Protesta Rekordo kiun starigis, organizas kaj mastrumas Kawaguchi (basisto de la bando *Voĉo Protesta*).

Aktiva // Protesta Rekordo eldonas diskojn de bandoj punk-krustaj. *Voĉo Protesta* vomkrikantas en Esperanto, sed, kiel diras Noiz, la tekstoj estas difektitaj, ĉar la muzikistoj de la bando estas nur komencantoj.

Sed por tiuj, kiuj ankoraŭ memoras pri la *Subgrunda Kompilo*, kuneldonita de *La Blua Papilio* el Brazilo kaj *Vinilkosmo*, plej gravas la intenco kaj muzika frapo ol la komprenebleco de la tekstoj dum la kantado. Gravegas la energio, kiu venas el la tripoj por rebati vigle la perforton de la socio. Muzikistoj punkaj, krustaj, grinckoraj, traŝkoraj, ktp tre bone tion respegulas...

Voĉo Protesta estas punk-krust-anarkia bando. Ĝi jam famiĝis en la subgrunda anarkipunka scenejo, kaj eblas trovi ĝiajn diskojn en diversaj distribuejoj subgrundaj en la reto tutmonde. La bando formiĝis en 2002. La kantisto kaj gitaristo verkas anarkipunkajn tekstojn. La bandanoj ofte partoprenas manifestaciojn kaj renkontiĝojn kontraŭmilitajn, anarkiistajn k.s. Ili koncertas en subgrundaj, protestaj, engaĝitaj kaj avangardaj scenejoj en Azio, celante senaŭtoritatan socion punkan. Feliĉe, ankoraŭ ekzistas junaj idealistoj!

Diskoj de Voĉo Protesta

1. *Diy Punk neniam mortos*: 7-cola disketo partigita kun la brita bando *Active Minds*
2. *Punk-solidareco de Japano-Singapuro*: 7-cola disketo partigita kun singapura bando *Blinded Humanity*
3. *Rezisti aŭ morti*: 7-cola disketo, nur *Voĉo Protesta*
4. *LUDO ET KL*: DVD filmita vive en Kuala-Lumpuro, Malajzio

Por kontakti la bandon, skribu al la gitaristo Nobuhiro Uemoto (Noiz) ĉe <http://a.sanpal.co.jp/protesta/>

Esperanto-invado en Myspace

En la tre sukcesa retejo *Myspace*, kiun uzas la artistoj kaj bandoj el la tuta mondo, kelkaj esperanto-artistoj faris siajn paĝojn por komuniki inter si kaj malkovrigi sin al neesperanta artistaro...

Dafnjo Lawless <http://www.myspace.com/daphnelawless>
DĴ Kunar <http://www.myspace.com/djkunar>
Dolchamar <http://www.myspace.com/dolchamar>
Hotel Desperado

<http://www.myspace.com/hoteldesperado>

Inicialoj DC <http://www.myspace.com/initialsdc>
Kaj Tiel Plu <http://www.myspace.com/kajtielplu>
Kore <http://www.myspace.com/kore49>
Le Punk <http://www.myspace.com/lepunkmadrid>
Martin & la Talpoj <http://www.myspace.com/martinwiese>
Piĉismo <http://www.myspace.com/pichismo>
Supernova <http://www.myspace.com/supernovaev>
Stefano Keller <http://www.myspace.com/saluton>
Zhou Mack & *La Fabo*

<http://www.myspace.com/zhoumacklafeve>

Vinilkosmo <http://www.myspace.com/vinilkosmo>

Retumis kaj spacumis por vi

Flo!

Unua Esperanto-disko de Double-Unu

Double-Unu registros ĉi-printempe sian unuan KD en Esperanto *Sen lim' ĝis*... kun 12 titoloj, de infankanto ĝis engaĝita kanzono, kun muzikoj elvokantaj nian vastan mondon.

Fransŭaz Roŝet kaj Patrik Delabi invitas vin pluvojaĝadi diske! Kiel dum koncertoj de *Tra la Mondo* (popolkantoj en 18 lingvoj), ĉiu kanzono havas sian propran mondon. Sursceneje tiu diverseco efektiviĝas nur per du personoj dank' al enscenejigo kaj uzado de perkutitejoj kompletigantaj bazon de akordiono/gitaro/kanto. Surdiske la diversaj muzikaj koloroj estas plifortigitaj pere de niaj muzikamikoj.

Verda plezuro (kelta roko pri vojaĝdeziroj de fraŭlino)

La birdinfanoj (balado parolanta pri vundoj de infanaĝo, akompanita per harpo)

Freneza semajno (infanludkanto el afrika inspiro por tradiri la semajntagojn)

Bonŝancon! (slovroka kanzono bondeziranta al infanoj bonŝancon en la vivo)

Sinĵor' Rubsak' (latinamerika kanzono pri temo "Ĉu ni preferas nutraĵon aŭ ĝian pakaĵon?")

Kie? (enumeracikanzono kiel itala tarantelo)

Trinku kaj kantu (kiel ĝia titolo ne indikas, eĵra kanzono pri akvoprezo kaj al kiu ĝi profitas. Biertrinkeja etoso)

Esti si (ĉeĉeneca kanzono pri elementoj kaj konscio)

Napokapo (reĵo "Estante neniam kiel tiuj napokapoj kiuj kunportas haton kaj furiozon sur tero mi deklaras min mensana. Ne preĝu por mi. Dankon".)

La amvarbantoj (instrumenta peco, koncepthava kaj kina)

Tri katidoj (jaza fantazio kun tri voĉoj pri la aventuroj de tri katetoj)

La parado de la literoj (infanludkanto fanfare por lerni la alfabeton)

Informojn pri prezoj kaj rabatojn petu ĉe la bando:

✉ Compagnie Double-Un, Avenue Adrien Fayolle
FR-26400 Crest, Francio ☎ 33 (0)4 75 25 17 15



Internacia Esperanto-Konferenco en Pazarĝik, Bulgario, 14a-20a de julio

Mitoj kaj legendoj

postkonferencaj ekskursoj al Plovdiv, Baĉkovo, Kazanlak, Karlovo

Kontaktaj: Georgi Mihalkov, 1229 Sofio, ĵ. k. "Nadejda" V, bl. 529, vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario

☎ (02)934-42-55 ✉ modest@abv.bg

Eric Laubacher, 1 rue Bougainville, FR-78180 Montigny-Bx.

☎ +33 1 30 96 67 91 ✉ kasisto@osiek.org

Se la tuta mondo estus Islando!..

En la februara *Ondo* aperis nia abonstatistiko por la jaroj 1998–2006 — resume kaj por 2006. Nun iom pli detale. En 2006 ni havis 545 abonantojn, sed dum naŭ jaroj ni ricevis 3856 individuajn kotizojn el 55 landoj. Plej multaj kotizoj venis el Ruslando — entute 1005 (26%). Tamen la procentaĵo de la ruslandaj abonantoj malkreskas: de 51,9% en 1998 ĝis 17% en 2006.

Ruslando	1005	Finnlando	168
Pollando	381	Svedio	158
Germanio	213	Italio	132
Usono	205	Japanio	128
Francio	202	Brazilo	126
Britio	180	Belgio	115

Malgrandaj landoj povas malfacile superi la grandajn laŭ la abonkvanto, sed la *relativan* staton vidu en la suba statistiko pri nombro da abonoj por unu miliono da loĝantoj, pagitaj dum 1998–2006. (Nur landoj kun pli ol 15 abonoj entute — do sen Luksemburgio, Irlando kaj Nov-Zelando.)

Islando	110,0 (32 / 0,29 mln)	Pollando	10,0 (381 / 38,1 mln)
Finnlando	32,0 (168 / 5,25 mln)	Latvio	7,86 (18 / 2,29 mln)
Estonio	20,1 (27 / 1,34 mln)	Kroatio	7,50 (33 / 4,44 mln)
Svedio	17,5 (158 / 9,04 mln)	Ruslando	6,98 (1005 / 143,9 mln)
Litovio	17,3 (59 / 3,40 mln)	Aŭstrio	3,75 (31 / 8,26 mln)
Danlando	12,7 (69 / 5,42 mln)	Francio	3,21 (202 / 62,8 mln)
Belgio	10,9 (115 / 10,5 mln)	Aŭstralio	3,00 (61 / 20,3 mln)
Svislando	10,7 (79 / 7,4 mln)	Britio (UK)	2,98 (180 / 60,3 mln)
Norvegio	10,2 (47 / 4,62 mln)	Germanio	2,58 (213 / 82,4 mln)

Okulfrapas la eŭropeco de la listo kaj la populareco de *La Ondo* en la landoj nordiaj kaj baltaj. En Islando la probableco renkonti abonanton de *La Ondo* estas 150-oble pli granda ol en Usono. Se en la tuta mondo oni abonus same aktive kiel en Islando (unu abono por 72,5 mil loĝantoj), nun *La Ondo* havus pli ol 80 mil abonantojn en la tuta mondo, inkluzive de 2 mil en Ruslando kaj 4 mil en Usono.

AIKo

Ricevitaj libroj

Centassi, René; Masson, Henri. *Žmogus, metęs iššuki Babeliui*: Liudvikas Lazaris Zamenhofas / Trad. el la franca Vytautas Rinkevičius. — Vilnius: Mosklo ir enciklopediju leidybos institutas, 2006. — 262 pĝ., il.; 1000 ekz. — [Donaco de LitEA].

Corsetti, Renato. *Knedu min Sinjorino!* tabuaj kaj insultaj esprimoj en Esperanto! — 2a eld., kompletigita kaj reviziita. — Traumiers: La KancerKliniko, 2006. — 36 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

DasGupta, Manashi. *Dormanta Hejmaro*: [Romano] / Trad. el la bengala Probal Daŝgupto; Antaŭpar. Claude Piron. — Antverpeno: FEL, 2006. — 239 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Künzli, Andreas. *Universalaj Lingvoj en Svislando*: Svisa Enciklopedio Planlingva: — La Chaux-de-Fonds: Svisa Esperanto-Societo; Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale, 2006. — 1129 pĝ., il. — [Donaco de Andreas Künzli].

Pasporta Servo 2007: La adreslibro de gastigantoj sub aŭspicioj de TEJO / Komp. Derk Ederveen. — Rotterdam: TEJO, 2007. — 187 pĝ., il. — [Membroekzemplero de Halina Gorecka].

Гудсков, Николай. *Страна Эсперантия*: Карманная энциклопедия. — М.: АСТ; Восток-Запад, 2006. — 159 с.; 2000 экз. — [Aĉeto].

Гудсков, Николай. *Элементарная грамматика языка эсперанто*. — М.: АСТ; Восток-Запад, 2006. — 91 с.; 2000 экз. — [Aĉeto].

Ricevitaj gazetoj

Esperanta Finnlando. 2007/1; Esperanto ektuall. 2007/1; Esperanto en Danio. 2007/1; Esperanto sub la Suda Kruco. 2007/2; Esperanto. 2007/3; Femina. 2007/9; Heroldo de Esperanto. 2007/2; Informa Bulteno. 2007/1; La Brita Esperantisto. 2007/962; La KancerKliniko. 2007/121; La Movado. 2007/671,672; La Ondo de Esperanto. 2007/3; La Revuo Orienta. 2007/1,2; La Sago. 2007/33,34; Literatura Foiro. 2007/225; Litova Stelo. 2007/1; Monato. 2007/3; Norvega Esperantisto. 2007/1;

Gazetoj

Goldoni en Literatura Foiro

La Goldoni-temo okaze de la 300-jariĝo de la eminenta dramverkisto estas unu el la akcentoj en la februara numero 225 de *Literatura Foiro*, per eseo de Carlo Minnaja, mem tradukinto de Carlo Goldoni en esperanton.

En ĉiu numero de la 38a jarkolekto de *LF* oni legos pri Goldoni kaj ĝuos sur la kovrilpaĝoj paŝtelajn desegnaĵojn kreitajn surbaze de liaj verkoj.

Ĉi-foje la uverturo ne estas poemo sed frazoj de Albert Camus. Sed poezion oni trovas interne: originalaj hajkoj de Christian Rivière plezurigos la ŝatantojn de ĉi tiu fajna versa formo.

Perla Martinelli konvinke klarigas kial ŝi ne voĉdonis por la 9a Oficiala Aldono. Donald Broadribb kontribuas al la semantika debato pri la altrudo de etnolingvaj signifoj al esperantaj vortoj. Giorgio Silfer komparas la decidon de la Lingva Komitato de Esperantio kun tiu de la Akademio de Esperanto, pri la surogataj alfabetoj.

Koincide kun la centjariĝo de la Ido-skismo, en la februara numero la abonantoj trovas la unuan parton de studo de Claude Gacond pri la vivo kaj didaktika kontribuo de markizo Louis de Beaufront. Jeremi Gishron recenzas la libron *Mi estas homo* kun verkoj de Zamenhof, eldonitan pasintjare de *Sezonoj*.

Vilhelmo Lutermano prezentas la libron *Sur la marmorklifoj* de Ernst Jünger, kiun LF-koop eldonis en 2006. La poemaron *Pulsas la viv'* de Lucija Borčić recenzas Julian Modest.

Pri elektroniko kaj kulturo meditas en sia eseo Radosław Nowakowski. Giorgio Silfer recenzas la filmon de Ramòn Barea *La pedal-aŭto*.

Zofia Banet Fornalowa respondas al la artikolo de Roman Dobrzyński kaj la letero de Louis Christoph Zaleski-Zamenhof pri *La Zamenhof-Strato*. En la leterkesto: Christian Declerck kaj Rolfo, ankaŭ respondo de la Esperanta PEN-Centro al Rolfo — el kio oni akiras pliajn pruvojn pri diversaj komplikecoj kun Aldo de' Giorgi, kiu ja estis Paula Mahrti.

La Esperanta PEN-Centro komunikas pri siaj du kandidatoj por la literatura Nobel-premio. *Mi restas en la Civito*, *fiera* titolas sian novjaran salutmesaĝon la eliranta Konsulo de la Esperanta Civito, prof. d-ro Walter Ŝelazny.

HeKo

Por la januara tasko *Sep proverboj* venis 18 respondoj — ĉiuj ĝustaj krom tri kun etaj devioj. Ilin sendis:

Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio); Erkki Kemppainen, Bruno Lehtinen (Finnlando); Emmanuel Debanne, Jackie Huberdeau (Francio); Hans-Burkhardt Dietterle, Nora Caragea (Germanio); Enrike Carleos Artime (Hispanio); Ester Olsen (Norvegio); Maria Boharewicz, Dorota Burchardt, Mirosława Kubicka, Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski (Pollando); Svetlana Konjašova, Oleg Vasiljev (Ruslando); Ludmila Orajevskaja (Ukrainio). La loto donis premion al **Mirolava Kubicka**. Ni gratulas!

La ĝustaj respondoj: Ne ĉio batas, kio tondras. Unua paŝo iron direktas. Eliris ridante, revenos plorante. Kiu rabi eliras, ofte nuda revenas. En propra angulo ĉiu estas fortulo. Larmoj ŝuldon ne pagas. Hundo bojas, homo vojas.

Atentemaj legantoj rimarkigis al ni, ke en la ĉifrita poemo *Sono gag!* enŝteliĝis mistajpoj kaj elglitis unu verso. Sed eĉ ni ne malhelpis solvi la taskon al sep gebravuloj: Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio); Bruno Lehtinen (Finnlando); Emmanuel Debanne (Francio); Enrike Carleos Artime (Hispanio); Dorota Burchardt (Pollando); Gennadij Turkov (Ruslando). La loto donis premion al **Dorota Burchardt**. Gratulon!

Jen la poemo, tia kia ĝi devus esti:

Juĝu mem!

Ĉu Sizif? , ĉu Donkiĥoto,
“ek!” ja estas via moto.

Multon vi komencas
kaj esperas, pensas,
ke en via griza niĉo
iam lumos la feliĉo.

Vi malŝparis vian energion.

[en la fino havas vi nenion.]

Nun vi ĵus deĉifris ĉi poemon?

Ĉu valoris ĉio ĉi la penon?

Magia kvadrato

11				
	12			
		13		
			14	
				15

En ĉiu kvadrateto skribu nombrojn de 1 ĝis 25 tiel ke ilia sumo sur horizontalaj, vertikalaj vicoj kaj grandaj diagonaloj estu egala. Tia kvadrato estas nomata magia. Anstataŭigu nombrojn per literoj kaj tralegu la proverbon.

A — 1; L — 2, 6; E — 3, 4, 9, 23; T — 5, 18, 20; O — 8, 15, 21, 24; S — 10, 14, 17; N — 11, 16; Ĉ — 12; R — 13; U — 19; K — 7; B — 22; M — 25.

Kiel solvon sendu la proverbon al la redakcio de *La Ondo rete* aŭ poŝte antaŭ la 15a de majo.

**En majo aperos anonco pri Liro 2008
kaj pri la 10a Internacia Fotoĥonkurso**

SPRITAJ SPLITOJ KAJ PRESKERAROJ

el la kolekto de reduktoro

Valoras sian prezon

Konstantino Rolniko. **INFANECO DE LA RIBEL-ONTO**. L' autobiografia romano en autoran e-redakcion, verkita propramane, disvastata tute senpage. (http://zhurnal.lib.ru/r/rolxnik_k_b/rolniko.shtml)

Ĵusa konsulo ne kapitul-lacas

La nova Kapitulo kunvenos en Bruselo la 19an de mar- to... unuafoje sub la prezido de la Ĵusa Konsulo, sen. Giorgio Silfer. (*HeKo* 326 2-C, 13 mar 2007; rimarkis Kalle Kniivilä)

Soldato de Esperanto eksprese reuzebla

...Fidel rapide rekuperiĝas (dissendolisto de Esperanto @ain.cu, 16 mar 2007; NPIV: rekuperi = repreni por uzo ion, kio povus perdiĝi)

Fidel ree sisteme kombata?

La venezuela gvidanto substrekis la ekzemplon de “resistemo kaj nun de kombato” de la kuba gvidanto. (dissendolisto de Esperanto@ain.cu, 28 feb 2007)

Hispanismoj plagas

Krome oni utiligas barilojn el vivantaj arboj, bionu- traĵojn kaj ili utiligas botanikajn preparaĵojn por elimini pla- gas. (dissendolisto de Esperanto@ain.cu, 1 mar 2007)

Künzli eble senkulpa

...inter la verkofino en 2005 kaj la surmerkato (januaro 2007) pasis preskaŭ du jaroj, sed probable pri tiu tempa distanco ne responsas la aŭtoro... Andreas Künzli. (“Svisa enciklopedio pri la Esperanta Civito”, *HeKo* 325 2-A, 2 mar 2007)

Künzli kontraŭ kulturo

Antaŭ ĉio necesus eviti, ke... la kultura kaj kleriga dimensioj estu pli efike flegataj kaj ke la individuaj kotizoj estu reduktitaj. (Andreas Künzli, *Esperanto*, 2006, №12, pĝ. 253; rimarkis Lu Wunsch-Rolshoven)

Ran-kvarteto tute (k)vaka

...la estraro serĉas ne nur prezidanton, estraranojn por Instruado kaj la Retejo sed nun ankaŭ estra-ranon... (*FEN-X*, 2007, №1-3; rimarkis Ionel Oneț)

Katolika Pre-sento?

Carlo Sarandrea prezentas pastron Battista Cadei antaŭ lia prelego. (*Katolika Sento*, jul-aŭg 2006, pĝ. 4; rimarkis Ionel Oneț)

Aber meine Herren!

Ertl, Istvan: *La Postdomo*. Paŭsaĵo. La verko... estas... satiro pri CO kaj estraro der UEA. (<http://www.esperanto-buchversand.de/prospektoj/Origlit.html>)

Plukis István Ertl



ESPERANTO-KALENDARO

16–23 maj. Batipaume (Francio). **AGDE 2007** ✉ 22 ZA La Bousquet, FR-34310, Montady, Francio 📧 chrizo@worldonline.fr

 12–20 jun. Mielno (Pollando). **29a Ĉebalta Esperantista Printempo** ✉ Box 30, PL 75-016 Koszalin-1 Pollando 📧 barslavo@poczta.onet.pl

20–27 aŭg. Montoire sur Loir (Francio). **Festo 2007** ✉ Jefe, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris, Francio 📧 louise@esperanto-jeunes.org

21–23 sep. Poznań (Pollando). **ARKONES XXIII** ✉ ul. Zawady 2/7, PL 61-002 Poznań, Pollando 📧 arkones@esenco.org

Mediti internacie

La oka Internacia Meditado aranĝita de Ŭonbulismo, religio el Koreio, okazos 20–25 aŭg 2007 en la urbo Iksan, Koreio. En ĉi tiu Meditado, bazita sur la Ŭonbulisma zenmetodo, oni povu — harmoniigante siajn korpon, spiron kaj koron — trovi sin mem pli libera kaj saĝa.

Veturkoston al Koreio ĉeestantoj mem kovras, sed la lokan koston kovras Zen-ĉambro de la internacia fako de Ŭonbulismo.

Petu informojn: esperanto@saluton.net.

Lee Jung-kee

Kredi sendogme

Kvakeroj kredas sendogme, ke al ĉiu homo eblas senpere trovi gvidon el dia fonto, kaj kunvenas en silento por kune inspiriĝi. Kvakera E-Societo aranĝos renkontiĝon en Poznań (Pollando) 28–30 maj 2007. Interesiĝantoj bonvenos.

Pliaj informoj: www.kveker.org/kes_kes.htm

Douglas Draper

Donacoj en 2006

Abonhelpa Fonduso

Anonima sinjoro (Nederlando)	123.00 EUR
Ignat Bociort (Germanio)	28.00 EUR
István Ertl (Luksemburgio)	40.00 EUR
Bård Hekland (Norvegio)	27.00 EUR
Kurisu Kei (Japanio)	27.00 EUR
Tatjana Kulakova (Ruslando)	390.00 RUR
Valentin Melnikov (Ruslando)	180.00 RUR
Vjaĉeslav Nasretidinov (Kazaĥio)	14.00 EUR
Jukka Pietiläinen (Finlando)	27.00 EUR
Munkena E-Klubo (Germanio)	30.00 EUR
Entute, en 2006	332.70 EUR

Amiko

Gerd Bernhard (Germanio)	11.00 EUR
Robert Bogenschneider (Germanio)	19.06 EUR
Jahan Derks (Nederlando)	68.00 EUR
Hans-Burkhard Dietterle (Germanio)	51.79 EUR
Bård Hekland (Norvegio)	18.00 EUR
Povilas Jegorovas (Litovio)	300.00 LTL
Josef R. Koch (Svislando)	19.00 CHF
Vjaĉeslav Nasretidinov (Kazaĥio)	10.00 EUR
Ursula Niesert (Germanio)	100.00 EUR
Werner Pfennig (Germanio)	60.00 EUR
Entute, en 2006	436.77 EUR

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

FOTORAPORTOJ




150 mil spektantojn allogis en februaro la tradicia karnavalo en Rijeka (Kroatio). Inter naŭ mil karnavaluloj, kiuj marŝis dum ses horoj, estis esperantista maskogrupo *Kato en botoj* kun speciala veturilo. (Vjekoslav Morankić)



Pluraj francaj, okcitanaj kaj katalunaj esperantistaj grupoj partoprenis 17 mar 2007 en la manifestacio por la okcitana lingvo en Besièrs (Okcitanio), organizita de la Instituto pri Okcitanaj Studoj kaj aliaj okcitanaj kulturaj asocioj. (KEA)

Kial luktante en la maljustaj kondiĉoj, Esperanto neniam malgajnas? Kie estas kaŝita la lingva forto?




Bildo de Sergej Krajuĥin (Sankt-Peterburgo)




Fjodor Dostojevskij.
Blankaj noktoj: Ses prozaĵoj.
448 paĝoj, € 30,0.



Anton Ĉeĥov.
Ĉeriza ĝardeno: Noveloj, dramoj.
352 paĝoj, € 27,0.



Rusa Novelaro. Volumo 1
La 19a Jarcento.
400 paĝoj, € 30,0.




Samideanoj: Satiroj kaj humurajoj
pri Esperanto kaj pri esperantistoj.
80 paĝoj, € 7,5.



Georges Simenon.
Amiko el la junaĝo de Maigret.
128 paĝoj, € 12,0.




Trevor Steele.
Diverskoloro: Originalaj prozaĵoj.
112 paĝoj, € 10,0.



Aleksander Korĵenkov.
Historio de Esperanto.
128 paĝoj, € 12,0.



L.L. Zamenhof
Mi estas homo.
288 paĝoj, € 24,0.



Aleksandr Duliĉenko.
En la serĉado de la mondolingvo.
160 paĝoj, € 15,0.